

Albana Esperanto-Asocio estas jure agnoskita laŭ decido nr 3503 dato 15/02/2013 de la Juĝejo de Tirana

BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO INSTITUTO

Nr. 108, aŭgusto 2013

Nia proverbo: Dolĉa lango rare estas sen dorno surpinte

Adreso de redakcio: p/a Bardhyl Selimi, Rr. Fortuzi 9/1/3 Tirana 1016 Albanio (00355682580758; bselimi@gmail.com)

Kunlaborantoj: Shaban Hasani 00355682080677, shabanhasani@gmail.com; Gjergji Gusho: 0035583222326, gjergji_gusho@yahoo.com; Agim Peraj: (00355694472430, agimperaj@yahoo.it; Sajmir Beqiraj: (00355684030613, s_beqiraj@yahoo.com; Nehat Sokoli: 00355682587699, nehatsokoli@gmail.com; Engjell Gusho: 00355692350111, engjellgusho@yahoo.fr; Rita Permeti: 0035542363 360; 00355686857800 ritapermeti@yahoo.com; Luan Jaupi: 00355682165870, luanjaupi@hotmail.com; Enkela Xhamaj: 00355685135105, xhamajkl@yahoo.com;

La enhavo

Ni kaj ILEI, AIS, UEA

Albanio, jam la 71-a membro de UEA

Gratuloj el samideanoj tra la mondo

Korespondo kun Aurora Bute

Tri kampoj de nia kunlaboro, de Stefan MacGill

Komitato vigladebate, Mark Fettes

Disdono de libroj

Konferencanoj de ILEI – tiuj ne rustiĝas

ILEI havas novan prezidanton

Komitato vigladebate (Stefan MacGill)

La estraro de ILEI

UK Rejkjavik finis siajn laborojn sukcese

UEA diplomas

Nia propagando

Esperantistoj sen limoj: Prelego en la Nacia Biblioteko en Tirana

Jen kiel propagandas Esperanton la brazilaj samideanoj

Ĉu esperantistoj lernu Esperanton por blogi- opinio

El la leteroj

Aloisio Sartorato, Paulo Cesar, Eniko, Salam Shany, Malgosia Komarnica, Renato Corsetti, Tatjana Loskutova, Aurora Bute

Turismo

Tra Albanio dum du semajnoj- reportaĝo

Beletraĵoj

Poeziaĵoj de Bedri Alimehmeti

Poeziaĵoj de Dritëro Agolli

Poeziaĵo el Brazilo

Novaj libroj

Aperis “Lundo en sep tagoj” de Luljeta Lleshanaku

“Padma la eta dancistino”, de Tibor Sekelj

“La sloganoj el ŝtonoj”, de Ylljet Aliçka

Nia Historio

Du fotoj malnovaj

Artikoloj

Artikoloj de la s-ro Paiva Netto

Ni kaj ILEI, UEA, AIS

Albanio jam la 71-a membro de UEA

Albanio en la UEA-familio

Albana Esperanto-Asocio fariĝis la 71-a landa asocio de UEA. La Komitato akceptis ĝian aliĝpeton en sia lunda kunsido kun 37 voĉoj por, neniuj kontraŭ, kaj unu sindeteno. AEA estis fondita en 1991 kaj komence nomiĝis Albana Esperanto-Ligo. Ĝia prezidanto estas inĝ. Shaban Hasani.

Sciigo de "Aŭroro", ĉiutaga bulteno de UK Rejkjaviko

Gratuloj de nia samideanoj tra la mondo

- Mi elkore gratulas pro la alta premio kiun aljuĝhis al Vi UEA! Male al la kutimoj, mi ne deziras al Vi labori ech pli bone kaj pli multe -- daurigu nur kiel Vi ghis nun laboris, sufichos!
Mi havus iun peton al Vi, sed chio dependas de tio chu Vi estos en Tirana nun?
Kun koraj salutoj,
Djordje, Serbio
- mi varme gratulas AEA-n pro ĝhia oficiala eniro en UEA-n.

Fabrizio. Italio

- **Mi gratulas kaj deziras fruktodonan kunlaboron.**
kore
Małgosia, Pollando

- Dankon pro la foto kaj gratulon pro la aligo! Nur bedaurinde, ke neniuj albano povis cheesti en Rejkjaviko.

Kore salutas
Ulrich Lins, Germanio

- ELKORE MI GRATULAS AL CHIUJ ALBANAJ ESPERANTISTOJ, PRO LA FAKTO, KE

ALBANA ESPERANTO-ASOCIO FARIGHIS LANDA ASOCIO DE UEA.

SIGMOND JULIA, UEA-DELEGITO DE CLUJ-NAPOCA, RUMANIO

- **Vivu Albanio, nun kiel oficialigita membro de UEA! Gratulon al niaj albanaj gefratoj!**

Saluton ! **Tamiris Assunção**, Brazilo

- Gratulon al via landa asocio pro aliĝo al UEA ! Pliajn sukcesojn mi deriras al vi.

Ĝis !

Edmond LUDWIG, Francio

- kun granda ghojo mi ricevis vian mesaghon, ke AEA estis akceptita dum la jhusa UK en Rejkjaviko kiel novalighinta Landa Sekcio de UEA!
Permesu ke mi nome de Austria Esperanto-Federacio (AEF) esprimu al vi niajn gratulojn kaj bondezirojn por tiu evoluo.
Je kunlaboro, kiam eblas!
Plejsamideane,
Prof. **Hans Michael Maitzen**, prezidanto de AEF
- Koregajn gratulojn al la albanaj E-istoj pro tiu eniro en la UEA-familion !!!

Germain Pirlot, Francio

- hieraŭ min bonorde atingis via sciigo pri la aliĝo de via E-asocio al UEA. Gratulojn! Tamen, mi pri tio mi eksciis kelkajn tagojn pli frue ;-), ĉar havis ci-rilatajn informojn el la interreto. Se vin interesas iujn informojn rilate al okazata nun UEA-Kongreso, bv. vidi la sube afiŝitajn E-paĝojn en la reto. Agrablan legadon!

Amike, Tatjana, Rusio

Por legi la kongresan kurieron de la UK 2013 en Islando, "La Aŭroro", bv. viziti la paĝon:

http://www.uea.org/kongresoj/uk_2013.html

Ĉiutage venas t.n. Gazetaraj Komunikoj verkataj de la Direktoro de UEA, legeblaj en :

<http://www.uea.org/dokumentoj/komunikoj/index.html>

Fotoj kaj rektaj raportoj troveblas en Vizaĝlibro:

Evento "La 98a Universala Kongreso de Esperanto, en Rejkjaviko, Islando"

<https://www.facebook.com/events/343441519095877/>

Komunumo:

<http://www.facebook.com/UK2013>

Retejo de la organizantoj (LKK) :

<http://esperanto.is>

Multaj fotoj, filmetoj en la FB-paĝo de la Esperanto-Servo de China Radio Internacia:

<https://www.facebook.com/criesperanto>

kaj en ilia retejo:

<http://esperanto.cri.cn/98uk>

Kaj certe kiel kutime aperas raportoj en la retejo Libera Folio:

<http://www.liberafolio.org/>

- Mi tre ĝojas. Mi gratulas vin tutkore. Akceptu miajn bondezirojn!

Mi deziras al vi kaj al Shaban sukcesan, fruktodonan

kaj tre prosperan agadon!

Mi deziras kreskon de Albana Esperanto-Asocio!

Organizu multajn grandajn kaj famajn aranĝojn!

Eble - UK en Albanio!!!

Tutkorajn brakumojn, Mara, Letonio

- Gratulojn! Bonvenon al la albanaj esperantistoj en nia rondon familian!
Korajn salutojn, **Elda, Italio**
- **Mi gratulas la novan prezidanton. Rroftë Shaban Hasani! Udhëheqësi i dashur i bashkimit tonë! Robert PONTNAU, Francio**
- **Saluton!**
Mi ne komprenas. Ankau en malnovaj Jarlibroj trovighas Albanio.
Kio estas nova?
Amike
Birgitta, Svedio
Gratulon al vi!
- **Kore salutas, Vera, Nederlando**
- **La via estas la 71-a landa asocio de UEA, kaj kiam estis nur 70 mi menciis la fakton en artikolo aperinta en mia loka ĵurnalo, por montri kiom populara estas nia admirinda lingvo.**

Mi bonŝance gajnis kunlaboron de loka ĵurnalisto, kaj ŝi aperigis artikolon pri mia plano restarigi mian E-klubon, je la 126-jara datreveno de Esperanto.

Neniu en mia urbo respondis, sed dudek-jara studento de la angla, legis la artikolon je interreta paĝo de mia loka ĵurnalo, miskomprenis la anglalingvaĵon, kaj volis membriĝi al mia klubo, petante ke mi unue instruu al li Esperanton interrete.

Problemo estis ke li loĝas en Kolombio, kaj mi ne scipovas la hispanan.

Tamen, mi petis helpon de la prezidanto de Kolombia Esperanto Asocio, kaj nun tiu studento de mia denaska lingvo lernas multe pli facilan kaj justan, internacian lingvon.

En tiu kunteksto, mia provo popularigi Esperanton sukcesis, sed ne en mia urbo, bedaŭrinde.

Tro da miaj samurbanoj kredas ke ne necesas lerni fremdan lingvon, ĉar ĉiuj fremduloj jam parolas la anglan. (Tiuĵ fremduloj estas nur hotelistoj kaj kelneroj, kaj tio sufiĉas,)

Por via intereso, jen la retejo de mia artikolo:

http://www.thewestonmercury.co.uk/news/education/bid_to_revive_group_to_talk_esperanto_1_2236496

Mi ne postulas ke vi scipovu la anglan, sed tiu ligilo ebligas al vi vidi foton pri mia iama klubanaro kiam ni gastigis samideanojn el Japanio, Germanio, Pollando kaj Bulgario dum nia Esperanto-Semajno en aŭgusto 1994. Niaj gastoj loĝis en niaj hejmoj, kaj ni veturigis ilin en niaj aŭtoj al la diversaj vidindaĵoj en nia distrikto.

Amike,

David Curtis, Britio



Foto de David Curtis Westona esperanto klubo

- Gratulon al AEA, al la nova prezidanto, al vi ĉiuj. Mi jam legis en la bulteno de UEA

Kun plezuro mi pensas pri belaj tagoj pasitaj ĉe vi

Amike, Ela, Pollando

- Saluton, kara amiko:-Dankegon pro la bela foto kiu vi transsendis al mi, ĉu?

Sanon kaj pacon al vi kaj al la estraranoj

Evandro, el Brazilo

- Karaj albanaj esperantistoj!
Mi volas gratuli vin pro la granda historia evento en via asocio. Des pli ke en tiu momento mi mem partoprenis la UK-on en Rejkjaviko. Mi memoras mian pasintjaran restadon en via belega kaj gastema lando. Memorante multe el viaj aktivuloj mi salutas vin nome de esperantistoj el Pollando

Stanislaw Mandrak – prezidanto, Pollando

- Koran dankon pro la informo, kara profesoro Selimi.

GRATULEGON !!!

Paulo César, Brazilo, www.bonavolo.com

- Mi ĝojas legi pri tio. Gratulon, albana samideanaro!

Amike,

James, Rezende Piton, (Argentino ?)

- La 4a bulteno "Aŭroro" de la UK de Rejkjaviko informas pri la eniro de Albana Esperanto-Asocio en la grandan UEA-familion ... Gratulon al ties prezidanto !
Verŝajne Bardhyl elvokis por vi nian eksterordinaran "aventuron" en via lando !
Memevidente ankaŭ multe valoras renkonton de samideanoj, kaj nian komunan, amikan toston" ni ege aprezi !
Momente, ni certe kunportis ĉi-tien la temperaturon de Tirana ! ? ! ...
Plej amiksamcelane,
Pol kaj Mirej !, Francio
- Gratulojn kaj bondezirojn al ĉiuj, kiuj kunlaboris por ke tio okazu!
Erik [Agavo] Felker, Usono
- SENDUBE, G'I MERITAS NIAJN GRATULOJN! ANTAU'EN, CIAM!

Celso Pinheiro

Eldonejo Lorenz, Brazilo

- Koran dankon por la informo ! - Se mi sciis antaŭe ke vi venas al Reykjavik, mi kontaktis vin kiam mi estis in Tirana kun la Europaj biciklistoj je la 4a julio !
Michael Cwik. Germanio
- Gratulojn kaj sukcesan movadan laboron!

Kun multaj salutoj,

Zsofia Korody, Germanio

- Mi elkore gratulas al Vi kaj albanaj samideanoj.

Mi ofte pensas pri nia interesa vizito en Albanio.

Multe da sano kaj energio por plua agado al ĉiuj.

Jagoda, Pollando

- Dankon, samideano.

Tio estas bela foto.

Amike, David.

- **Gratulon al Albanio**

Mi deziris saluti kun tutkoran gratulon

pro via landa asocio farigís UEA Membro.

Sincere via HOPE Kim (KOREA) esperanto@hanafos.com

Homo Ornamita Per Esperanto

Kim Young

kaj daurigajn sukcesojn!

Elkore ekde ARGENTINO.

<http://mendozaesperantorondo.blogspot.com.ar/2013/07/el-esperanto-en-argentina.html>

Ro.Sartor

Esperantorondo.blogspot.com

mendozaesperantorondo.blogspot.com

Gratulojn!

Carlo

Korespondo kun Aurora Bute

2013/7/14 Aurora Bute <a_bute@yahoo.com>

Kara Bardhyl,

Jhaudon mi ekvojaghos al la UK, kie mi devas raporti al la Europa Komisiono.

Pri Albanio mi povos diri ke:

1. oni starigis la landan asocion lauleghe
2. ekzistas faldfolio en la albana
3. esta/o/s eldonata la shlosilon en la albana

Lau mia scio vizitos vin Tatjana de Rusio.

Kion alian mi raportu?

La plej grava demando kaj la plej atendata respondo: kiam okazos tutlanda arangho, por elekti estraron kaj lanchi agadstrategion?

Chu vi sondis pri tio?

Vi havas monon en la konto che UEA, vi povas pagi la vojaghkostojn au la restadon.

Mi petas vian respondon ghis malfrue mardo, se eblas...

Antaŭdanke,

Aurora

Respondo:

Jes Tatjana vizitos nin aŭguste. Je la 20-an de julio vizitos nin du polaj esperantistoj. Kiel vi vidis du lastajn semajnojn de junio vizitis nin du francaj esperantistoj.

Vi povas diri ke AEA entreprenis viglan sukcesan agadon, kunlabore kun s-ro Tomasz Chmielik el Pollando, por tradukado de la albana beletro en Esperanto. Tiel, ĉi semajne aperos volumo kun poeziaĵoj de Luljeta Lleshanaku kaj ene de aŭgusto novelaro "La Sloganoj per ŝtonetoj" de Ylljet Alicka.

Estas jam tradukite pluraj romanoj de la renomaj albanaj verkistoj kiel Ismail Kadare kaj Fatos Kongoli kaj aliaj volumoj kun poeziaĵoj el albanoj el Kosovo kaj Makedonio. Tion ni forte uzos, kiel fakte ni faris ankaŭ antaŭe, por nia propagando pri Esperanto enlande okaze de promovigoj je la ĉeesto de preso kaj TV.

Antaŭ kelkaj tagoj mi havis interesan rendevuon kun la ministro aktuala pri kulturo kaj Junularo s-ro Visar Zhiti, cetere renoma verkisto. Li konatiĝis kun la situacio de Esperanto enlande, ricevis kelkajn niajn eldonaĵojn kaj promesis fari plejblon helpi nin. Ĉi kaze ni promesis traduki en Esperanto lian romanon la Enterigiro Senfina, unika en nia beletro je temo universala.

La provizora estraro de AEA jam funkcias. (prezidanto Shaban Hasani, sekretario Bardhyl Selimi, Kasisto Sajmir Beqiraj). En la distriktoj ankoraŭ aktivas Luan Jaupi, Nehat Sokoli, Gjergji Gusho, Engjell Gusho, Agim Peraj, Enkela Xhamaj, Tonin Cobani ka.

Ni planas aranĝi lernokurson kun la laborantoj de la Nacia Biblioteko de Tirana kaj, post la komenciĝo de la nova lernojaro, klopodos starigi novajn lernokursojn en la lernejoj kaj laŭeble en la universitatoj.

Nia strategio celas ke la membraro plijuniĝu kaj la studentoj gvidu estonte la movadon.

Septembre eklaboros la nova registaro post la ĝeneralaj balotoj okazintaj juniofine. Espereble novaj aŭtoritatoj ĉe la ministerio pri edukado estos pli bonkomprenemaj kaj kunlaboremaj kun ni.

La tutlando kunveno povas okazi nur post kiam ni varbos kaj trejnigos sufiĉe maturajn novajn entuziasmajn esperantistojn. Ni neniam celos aranĝi pompaan kunvenojn nur por reklamo. La mono ĉe UEA certe uzatos laŭkonvene.

Konklude, AEA nun ekspektas organizi la movadon enlande pli sistemece des pli ke jam ne plu ekzistas leĝaj baroj por ĝi.

Ankoraŭ sukcesojn al vi. Amike Bardhyl

Tri kampoj de nia kunlaboro

Mia celo estas koncize prezenti tri kampojn por nia kunlaboro.

Membro-varbado por 2014

Kiel vi scias, la membronombro en UEA faladas, kiu siavice limigas niajn enspezojn kaj niajn eblojn investi en monda evoluigo. Tial, la nova estraro donas prioritaton al membro-(re)varbado tra la periodo de oktobro 2013 ĝis marto 2014. Ni forte petas vin ludi aktivan rolon en tiu laboro. Ni jam surloke kreis tekston por nova varbilo, kiun vi ricevos kaj povos plie mendi. Baza tasko de via kotizperanto estas remembrigi ekzistantajn membrojn, sed necesas ankaŭ atingi ĝisnunajn nemembrojn ĉe vi, por konvinki ilin aldoniĝi al la monda familio. En tiu laboro estus dezirinde, ke la tuta estraro de la Landa Asocio formulu planojn kaj helpu al la kotizperanto realigi tiujn. Krome, ni pretigos afiŝojn kaj materialojn por la starigo de UEA-budoj en viaj kongresoj kaj aranĝoj; sekvos ankaŭ Gvidilo pri Membrovarbado – surbaze de tekstoj liveritaj el landoj, kie la varbado jam bone funkcias.

Aktivula trejnado

Ni serĉos kunlaboron kun iuj Landaj Asocioj pri organizado de trejnsesioj aŭ seminarioj tra la sekva periodo, kun la unua imageble frue en 2014. Tion ni celas en almenaŭ du kontinentoj, kun latinamerika seminario iel ligita al la UK en Bonaero aŭ la ILEI-konferenco en Montevideo. Necesas ellabori organizan kaj financan dividon inter la centra UEA kaj la Landa Asocio, sed esence UEA liveros la enhavon (tre eble kun enplekto de enlandaj kapabluloj) kaj la Landa Asocio la logistikon. Se via lando interesiĝos pri tio, bonvolu kontakti nin!

Superrigardo de nuna stato

Ekde nun ni komencos arigi landajn dosierojn, kiuj kunigu ĉiun eblan utilan informon pri viaj landoj. Poste, vi ricevos la kompilon por via lando cele al via kontrolo kaj kompletigo. Kadre de tio, ni ĉe la jarfino petos al vi koncize resumi la atingojn kaj eventojn el 2013 kaj viajn planojn por 2014. Celo de la superrigardo estas krei resumon pri ĉiuj fakaj asocioj, kiuj agas en la via lando, ĉu formale, ĉu per unuopuloj. Enprenindas informoj pri E-Centroj, bibliotekoj kaj lokaj grupoj – la informoj pri tiuj grandparte ekzistas, sed diversloke. Proksimuma modelo pri tiuj raportoj videblas ĉe la retejo de ILEI ĉe www.ilei.info, sub 'Instancoj > Landaj Sekcioj'. En ILEI ni kompilis jarajn raportojn de la sekcioj por 2009, 2010 kaj 2011.

Kore

Stefan MacGill
Vicprezidanto de UEA
Komisiito de ILEI pri Juna amiko kaj kurso e125.

KOMITATO VIGLADEBATE

Okazis vendredmatene, la 26an de julio, la lasta kunsido de la Komitato, kun emfazo je la estonta agado. Ĝin karakterizis vigla kaj bonkvalita debatado.

Buĝeto 2014 estis akceptita, sed kun du montransigoj ambaŭ je valoro de mil eŭroj. Estraraj vojaĝkostoj reduktiĝos ĝis €9000, sendokostoj ĉe Jarlibro reduktiĝos ĝis €6500. Tio ebligis plusojn ĉe Movada Evoluigo: Edukado altiĝas ĝis €4000 kaj eksteraj rilatoj ĝis €3000.

La buĝetoj por fondaĵoj en 2014 estis senmodife akceptitaj.

La Komitato konfirmis la decidon de la estraro enrezervigi en la kapitalo sumon de cent mil eŭroj por renovigo de la asocia retejo kaj administrado. La Estraro alprenas la devon regule raporti al la komitato kaj membroj pri la realigo de la planoj.

Elektitaj estas nova konsisto por la Komisiono pri Financo kaj Administrado, kaj du novaj revizoroj.

La Komitato aprobis la starigon de Konsilio kaj regularon kiu difinas ĝian rolon. Post diskuto, la sekvaj konsilianoj estis akceptitaj: Petro Balazs (Slovakio), Heidi Goes (Belgio), Huang Yinbao (Trezoro, Ĉinio), Johannes Mueller, Zsófia Kóródy (ambaŭ Germanio), Mélanie Maradan (Svislando), Francesco Maurelli (Italio), Veronika Poór (Hungario), Orlando Raola (Usono), James Resende Piton, Rafael Henrique Zerbetto (ambaŭ el Brazilo), Amri Wandel (Israelo), István Ertl (Luksemburgo), Michela Lipari (Italio).

La Komitato plie faris modifeton en la regularo de la Internacia Kongresa Universitato kaj en tiu pri kotizperantoj. Restis malmulta tempo diskuti la Strategian Planon; oni atentigis pri la graveco pli bone konigi ĝin, laŭeble poparte per pli simplaj kaj klaraj tekstoj. Post la aldono de unu frazo pri E-kursoj por poŝtelefonoj, la komitato akceptis la Strategian Planon.

Stefan MacGill
Vicprezidanto de UEA
Komisiito de ILEI pri Juna amiko kaj kurso e125.

La estrao de ILEI

Respondecoj de Estraranoj

Antau du tagoj ni prezentis al vi la novan estraron kaj tre koncize la tri subteamojn. Jen listo de precizaj laborkampoj por unuopaj estraranoj:

Mark Fettes - prezidanto.

Gvidanto de la subteamo 'Mastruma Evoluo.' Strategia laborplano, Financoj, Oficejo, Kongresa politiko, TEJO, CED, uea.org

Martin Schaeffer – ĝenerala sekretario

Komitato, Komunikado politiko, Delegita Reto, Financoj kaj administrado (kunlabore kun Fettes)

Stefan MacGill – vicprezidanto

Gvidanto de la sub-teamo 'Movada Evoluo.' Kapabla agado (ILEI, edukado.net, aktivula trejnado), Komisionoj pri Oceanio kaj Afriko

José Antonio Vergara

Konsciigo: Tutmonda Inform-Reto (TIR); Faka agado, Terminologia Esperanto-Centro (TEC), IKU; TEJO kaj CED (kunlabore kun Fettes)

Stefano Keller

Gvidanto de la sub-teamo 'Monda Evoluo.' Konsciigo: Komisiono pri Rilatoj kun Internaciaj Organizaĵoj (KRIO), Ĝemelaj urboj

Barbara Pietrzak

Kultura evoluigo (i.a. Akademioj Lingva kaj Literatura, Belartaj konkursoj), Komisionoj pri Eŭropo kaj Mezoriento/Nord-Afriko

Lee Jungkee

Kapabligo (kunlabore kun MacGill), Novaj landaj asocioj, Komisiono pri Azio, E-Centroj

Unujara kurso

Jen informoj pri la unujara kurso de instruista trejnado kiu septembre komenciĝos en la universitato de Poznano en Pollando. Viaj komitatanoj delonge ricevis la informojn, nun ni sendas ilin ankaŭ al la Asocioj mem. Via helpo estas bezonata trovi kaj kuraghi partoprenontojn.

Bonvolu legi la suban kaj aldonitan dokumenton; parto de ĝi rekte alparolas la Landajn Asociojn.

Bedaurinde, jam pasis la limdato por peti stipendiojn; tiuj estas jam deciditaj.

Antaŭdankon!

--

Stefan MacGill

Vicprezidanto de UEA

Komisiito de ILEI pri Juna amiko kaj kurso e125.

INSTRUISTA TREJNADO – UNUJARA KURSO

en la kunlaboro de la Interlingvistikaj Studoj de UAM, ILEI kaj Edukado.net

La Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz (Poznano, Pollando) kaj ILEI denove kune organizas unujaran instruistan trejnadon, kiu disponigas la bazajn konojn necesajn por instruado de esperanto kaj trejnos la partoprenantojn pri metodiko.

La kursaro necesigas partoprenon dufoje en la surloka intensa semajna sesio (la unua 14-20 sept. 2013, la dua 01-07 feb. 2014) kaj intertempan hejman laboradon, retan konsultiĝon kun la kursgvidantoj kaj pretigon de laboraĵo pri metodika temo, kies prezento kun la fina ekzameno okazos en septembro 2014. Sukcesintoj ricevos ILEI-diplomon pri instruista trejnado.

Kondiĉoj: bona lingvoscio (min. B2, atestilo pri esperanto-ekzameno estas bonvena) kaj baza kono de esperanta kulturo, krome finita mezgrada lernado (tipo de abiturienta ekzameno).

Partoprenkotizo: A-landoj: 300 EUR, B-landoj 130 EUR por unu semestro. ILEI-UEA ofertas stipendiojn. Informo kaj aliĝo ĝis la 10a de aŭg.: interlin@amu.edu.pl, <http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html>

El la Programo:

Lingvopedagogio (Katalin Kováts, Zsófia Kóródy, Ilona Koutny): ·

- Bazaj faktoroj de lingvopedagogio (instrumetodoj, instrupocezo, evoluigo de kapabloj, taksado, lingva interfero, ktp.) ·
- Esperanta metodiko (instruado de elparolo, gramatiko, vortoprovizo kaj kulturo, planado de lecionoj kaj kursoj, ktp.) ·
- Instruhelpiloj (de instruista kofro tra eldonaĵoj, filmoj ĝis retkursoj)

Esperanta kulturo (Tomasz Chmielik, István Ertl, Aleksander Korĵenkov, Ilona Koutny): ·

- Plej gravaj eventoj de la historio de esperanto ·
- Ĉefaj periodoj kaj verkistoj de e-literaturo ·
- Tiklaj punktoj de e-gramatiko
- Lingva trejnado (per testoj)

Donaco: partopreno en la aktualaj kursoj de la Interlingvistikaj Studoj (i.a. de Humphrey Tonkin pri e-movado).

Livero de libroj en la nacia biblioteko

La 22-an de julio 2013 oni liveris al la laborantoj de la nacia biblioteko en Tirana pliajn 5 ekzemplerojn de la lernolibro “Ĉu cu vi parolas Esperanton?”, Verkite de s-ro Bardhyl Selimi. En la

ties fonduso jam ekzistas 5 ekzempleroj. Oni planas dissendi pliaj ekzemplerojn al la kvartalaj bibliotekoj de la ĉefurbo

Rita Permeti

Konferencanoj de ILEI – tiuj ne rustiĝas

Kun la temo 'Instruado de Esperanto al ĉiuj generacioj', la 46a Konferenco de ILEI estis inaŭgurita en la 13a de julio 2013. Al la aranĝo aliĝis ĝis nun 104 personoj, do temas pri la tria sinsekva konferenco de la ligo kun pli ol cent partoprenantoj. Tiuj inkluzivas junulojn en la paralele organizata Somera Arbara Lernejo (SALO 8), kiuj dividas kelkajn programerojn kun la konferenco, kaj ebligas okazigon de modelaj lecionoj.

Antaŭ la malfermo alvenintoj per komuna ekskurso konatiĝis kun Herzberg - la Esperanto-urbo – kaj kun la Eo-muzeo en ĝia kastelo, kaj montris sin pere de koncerto en la urbocentro. La urbestro de Herzberg, s-ro Gerhard Walter, partoprenis la malfermon en Herzberg-Sieber kaj salutis ĝin en Esperanto, citante pri la konferenca temo la proverbon: 'kiu haltas, tiu rustiĝas'. Li persone emfazis tion per la aldono: 'kaj tiu, kiu ĉesas lerni, rustiĝas ankoraŭ pli rapide.' Salutis la konferencon ankaŭ s-ro Ahlborn, la vilaĝestro de Sieber, kie okazas la konferenco.

Paralele kun la konferenco okazas laborgrupaj kunsidoj pri ekzamenoj, sub gvido de d-ro Rudolph Fischer, cele al kreo de materialoj je KER-niveletoj A1 kaj A2. Alian seminarion gvidas Sabine Trenner, kun temo 'Vojoj el konfliktoj – mediaciado'. Ses-partan metodikan seminarion gvidas dr-ino Katalin Kovats.

Kunsidis en la mateno de la 14a de julio la komitato de ILEI, kun 34 rajtigataj voĉdon-mandatoj kaj kun ses el la naŭ estraranoj. Ĝi tralaboris la unuajn dek punktojn de sia tagordo, sub prezido de la aganta prezidanto, Zsófia Kóródy. Post organizaj decidoj kaj kontroloj, ĝi starigis du laborgrupojn: unu pri la evoluigata sistemo de modula instruista trejnado (MITE) kaj alia por definitivigi la tekston por serio da dulingvaj varbiloj por prezenti la edukan valoron de Esperanto. Post tio, la Komitato traktis jarraporton pri 2012, notis kun malkontento, ke kompilita raporto el la sekcioj ne estas pretigita, kaj ricevis financon pri 2012, kiu feliĉe indikas mildan deficiton, (nur 10% de tiu buĝetita) kaj stabilan situacion ĉe la kapitalo. La sesio de la 15a de julio (lundo) komenciĝos per fintrakto de raportoj el 2012, senŝarĝigo de la estraro pro tiu jaro kaj elektoj por re kompletigi la estraron. Post tio sekvos trakto de aliĝpetoj de novaj sekcioj, kaj diskutoj pri la estonta laboro ĉe eldonado, konferencoj, financa kaj membrara prizorgo kaj en la eltrovo de novaj manieroj plekti sin en la intencojn de la Strategia Plano de UEA, precipe ĝia parto pri 'Kapabligo'.

Teksto: Stefan MacGill Fotoj (aparte): Mirejo Grosjean

Por tuja kaj plia diskonigo.

Pli da informoj: <http://ilei-konferenco.esperanto-urbo.de>

Jen la dua komuniko pri la 46-a Konferenco de ILEI.

ILEI havas novan prezidanton

La 46a Konferenco de ILEI eniras sian trian tagon, en kies mateno okazis la dua kunsido de la Komitato de ILEI. Komence ĝi akceptis la daŭrigan tagordon kaj akceptis kun aplaŭdo la financajn raportojn pri 2012, sub kompreno, ke tiuj ne estas revizoritaj, kaj du/tri spezoj estas ankoraŭ konendaj. Post tio, la estraro estis senŝarĝigita rilate al la jaro 2012. Je tiu punkto du ĝisnunaj estraranoj, Zsófia Kóródy kaj Stefan MacGill demisiis el la estraro, konforme kun siaj anticipaj deklaroj pri tiu intenco. Ties motivo estis doni al la Komitato plenan liberecon en elekto de nova prezidanto.

Je tiu punkto transprenis la prezidadon la organiza teamo, Monique Arnaud kaj Marc Cuffez, kiuj plenumis la rolon de la elekto-komisiono, neniu el kies membroj partoprenas la konferencon. Tiu teamo konstatis, ke estas klare kaj sufiĉe anoncita nur unu kandidato: s-ino Mirejo Grosjean el Svislando. Post sinprezento, ŝi forlasis la salonon por ebligi liberan diskutadon. Post tio komenciĝis la balotado, kun tiumomente 36 validaj voĉdon-mandatoj. La rezulto estis elekto kun 34 poraj, 1 sindetena kaj 1 kontraŭa voĉo. Post aplaŭdo sekvis akceptigaj rimarkoj de la nova prezidanto, kiu interalie aludis al la dezindireco okazigi trian Mondan Konferencon pri la Instruado de Esperanto, post la unua tia en Ĝenevo en 1922 kaj la dua en Prago en 1927. Post tiuj rimarkoj, la komitato pluiris al aliaj temoj.

La aliĝpeto kaj statuto de instruista sekcio en Sud-Afriko estis anticipe dissendita kaj montrita; la sekcio estis unuanime akceptita. La prezidanto de IEK, la gvidorgano de la internaciaj ekzamenoj de UEA kaj ILEI fariĝis per unuanima decido, s-ro Karine Arakelian el Armenio. La komisiito pri kandidatigo de novaj sekcioj transiris al s-ro Bharat Ghimire el Nepalo. Decidite prokrasti la elekton de nova vic-prezidanto ĝis la lasta sesio merkred-matene.

Notinde, ke la fonda prezidanto de ILEI en 1949 en Bournemouth, Britio estis s-ino Violet C. Nixon; sekve post sesdeko da jaroj, ILEI havas sian duan prezidantinon.

Dume, la konferenco pluiras kun riĉa kaj varia programo, priskribota en posta komunik

Pretigis: S. MacGill kaj M. Grosjean

UEA DIPLOMIS 12 ELSTARAJN AGANTOJN

En la Solena Fermo de la 98-a UK en Rejkjaviko oni anoncis la nomojn de 12 esperantistoj, kiujn la Estraro de UEA honorigis per Diplomo pri Elstara Agado aŭ per Diplomo pri Elstara Arta Agado.

Diplomo pri Elstara Agado:

Grietje Buttinger (Britio) pro gastigado de esperantistoj dum pluraj jardekoj; **Kostas Kiriakos** (Grekio) pro lia ampleksa libro en la greka pri Esperanto, aperinta okaze de la 125-jariĝo de la lingvo; **Zsófia Kóródy** (Germanio) pro instrua agado kadre de ILEI, KER-ekzamenoj kaj la Interkultura Centro Herzberg; **Hans Michael Maitzen** (Aŭstrio) pro reprezentado de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Vieno; **Mélanie Maradan** (Svislando) pro agado ĉe internaciaj terminologiaj instancoj kiel reprezentanto de UEA; **Arikapalli Giridhar Rao** (Hinda Unio) pro multflanka Esperanto-agado en la faka, instrua-ekzamena kaj organiza kampoj; **Roland Rotsaert** (Belgio) pro okupiĝo pri la

Esperanto-biblioteko en la flandra urbo Kortrejko; kaj **Bardhyl Selimi** (Albanio) pro lia rolo en la plifortigo de la albana Esperanto-movado.

El la leteroj

Esperanto hodiaŭ fariĝis 126-jara! Kaj do?

Neniu linio pri tiu evento en la brazila gazetaro. Estas nur spaco por publikigo de novaĵoj pri la papa vizito al Rio. Nur!!!

Kaj ene de la E-movado?

Kompleta silento. Nenia aludo al la dato. Nenia retmesaĝo pri la afero. Nenia analizo pri la periodo citita.

Kio okazas ekstere kaj interne de la E-movado? Kion oni konkludu pri tio?

Aloísio Sartorato

UEA delegito en

Rio, Brazilo

Kara Bardhyl,

multan dankon. Jen plua kontribuo.

Mi rimarkis en la mapo de lokaj Esperanto-kluboĵ, ke estas registritaj nur ok en Britio. Povus esti iom pli ol tiuj; ne estas registrita ekzemple La Londona Esperanto-Klubo. Tamen certe ne estas multe pli ol tiuj.

En la sepdekaj jaroj simila mapo montris ĉirkaŭ 70. Do kio okazis? Oni kutime pretekstas, ke la kluboj mortas pro la Interreto, sed tion mi ne akceptas. La Interreto donas des pli da ebleco organizi lokajn klubojn; ĉiu ajn povas starigi retpaĝojn por loka klubo, kaj tiel varbi lokajn homojn al Esperanto.

Tiun situacion mi antaŭvidis en 1999 kaj 2000, kiam mi prelegis ĉe la Brita Kongreso de Esperanto kaj La Londona Esperanto-Klubo sub titolo 'Nova Epoko: Nova Pensado'. Aperis artikoloj miaj pri tiu temo ankaŭ en La Brita Esperantisto kaj Revuo Esperanto.

La esenco de mia mesaĝo estis, ke la Interreto donas novajn eblecojn por la evoluigo de la movado. Ĝi donas eblecon ne nur prezenti nin al vasta publiko, sed ĝi donas ankaŭ la eblecon de amasa membriĝo en Esperanto-organizaĵoj. Per malaltecosta 'reta membreco'

ĉiuj Esperanto-organizaĵoj havus la kapablon dekoblige, aŭ eventuale centoblige, sian membraron. Mi ekzempligis, kiamaniere oni povus tiun eblecon ekspluati.

Aliflanke, mi argumentis, se la Esperanto-movado ne adaptiĝos al la novaj cirkonstancoj, ĝi mortos. Ĝuste tiel okazas. Kial oni tion permesis?

La simpla fakto estas, ke la restantaj Esperanto-organizaĵoj en mia lando ne plu strebas antaŭenigi Esperanton. Povus kompreneble esti, ke unu-du lokaj kluboj pri kiuj mi ne scias, faras sian eblon en malfacilaj cirkonstancoj, sed ĉio kion mi vidas en la nuntempa 'movado' kondukas min al la ideo, ke la sola restanta ekzistokialo por Esperanto-organizaĵo estas paroli en Esperanto. Neniu plu interesiĝas pri la koncepto de Esperanto-klubo en la tradicia senco; grupo kiu provas persvadi la publikon kaj la instancojn enkonduki Esperanton.

La vera kialo, ke kluboj mortas, estas ke ili fariĝis nuraj lingvokluboj, kie lingvemuloj povas ekzerci la lingvon. Rapida rigardo al la retejo de La Londona Esperanto-Klubo konfirmos tion. Kaj ne plu aperas io ajn en la angla por allogi novulojn. La kluba bulteno tute kontrastas kun tiu kiun ni lanĉis en 1978, kun veraj novaĵoj pri Esperanto en la Londona regiono. La plej signifa novaĵo pri la jarkunveno estas, ke ĝi iris glate. Kion tio signifas? Ĝi signifas, ke ne ĉeestis iu ĝenulo kiu demandis, ekzemple, ĉu la kontoj estas kontrolitaj (kiel mi faris), aŭ propono, ke la klubo uzu iom de sia mono (£80 000 - ĉirkaŭ cent en eŭroj aŭ dolaroj) por progresigi Esperanton (kiel faris Honora Vicprezidanto Husejn Al-Amily, kun mia subteno). La poste anoncita kurso okazis malgraŭ la streboj de la klubaj gvidantoj. Estas tute klare, ke la klubo ne ekzistas por antaŭenigi Esperanton.

En tiaj cirkonstancoj, estas neeviteble, ke Esperanto-organizaĵoj en la lando formortas. La bezono por nuraj lokaj lingvoekzercejoj malpliigis pro la Interreto. Mi ĉiutage uzas Esperanton, kaj se mi vere bezonus la praktikan parolan ekzercon mi pli aktive uzus Skajpon. Lokaj kluboj povus havi vere gravan utilon, kaj gajni membrojn, se ili vidus sian rolon kiel antaŭenigi Esperanton inter la publiko.

Se la ĉefa ekzistokialo de tiuj samaj organizaĵoj estus por antaŭenigi Esperanton, estas neniam bona kialo, ke ili ne prosperu. Ĉu Esperantistoj en aliaj landoj opinias tiun vidpunkton tiom freneza kiel ŝajne pensas la britaj Esperantistoj?

Kore salutas lan.

Koran dankon karulo, pro la bonega sendo.

Ghis poste, fartu bone en Albanio.

Samideane via,

Paulo César

www.bonavolo.com

Kara Profesoro mi ĵuras vin ke mi estas sistema lernantino la albanan kaj esperantan lingvon por via helpo, kaj mi sentos al vi la libro el Székely Tibor kiu estas alia granda esperantisto kaj el la lia 100 jara naskiĝo la esperanistoj el Subotico skribas kaj printas libron.

Cu la adreso estas?

Bardhyl Selimi

Rr.Fortuzi 9/1/3

1016 Tirana

Albanio

Sed por mi ne estas ebla vojaĝi al Albanio ĉar mi ne havas monon mi ne vojaĝos nenie, kaj la ali granda problemo estas ke mi havas patron alkoholiston kaj fratinon kiun mi tre amas kaj mi havas mian albanujo amiko muslimano kiu mankas mian helpon tial mi vojaĝas el Albanujo ĉar mi scias 100% ke mi neniam vojaĝos hejme kial mi vizitos vian landon...

Ĉar kial vi havas monon kaj afablon viziti Vojvodina en Serbujo, Vi kaj Via edzino estas hejmantaj en nia domo:)))kaj mi montrigas vin nia urbo kaj nia lando

koran amikon

enikõ, Serbio

Estimata Shaban Hasani

Albana Esperanto-Asocio

Tre estimataj samideanoj

Elkorajn salutojn el Nepalo.

En esperantujo mi nomiĝas kiel Mian Salam SHANY. Mi estas estrarano de Pakistana Esperanto-Asocio (PakEsA), por Kaŝmir Regiono. Nun mi plentempe volontulas ĉe la Nepala Esperanto-Asocio (NEspA) kie:

- mi instruas Esperanton al komencantoj kaj ankaŭ al progresantoj.
- por fondi modernan kaj tre utilan esperantan bibliotekon en la oficejo de NEspA mi serioze apogas kaj kolektas la esperantajn librojn, revuojn kaj aliajn materialojn.

- kunagadas kun la estraro de NEspA por serĉi manierojn per kiuj ni povas plifortigi Esperanto movadon en Nepalo kaj ankaŭ en aliaj landoj de Azio precipe en sudaziaj landoj.

Grava Anonco: *Ni jam planis okazigi Specialan Ekskurson 2014 en Nepalo. Bonvole vidu la alligitan dosieron por pli da detaloj. Ni esperas ke tiuĉi alloga ekskurso ege plaĉos al vi kaj ankaŭ viaj amikoj tuj decidus partopreni en ĝi.*

Plue ni volas eldoni unu paĝan broŝuron en diversaj lingvoj por disdoni ĝin al la turistoj en Nepalo kaj tiel rilate ni bezonas vian valoran helpon por traduki subajn du frazojn en viaj lingvoj pro kio mi estos dankema al vi. Bonvolu mencii la esperantan nomon de la lingvo en kiu vi tradukos.

1. *Ni elkore bonvenigas vin kaj viajn amikojn al bela Nepalo.*
2. *Esperanto estas vere tutmonda lingvo.*

Bonvolu akcepti miajn sincerajn bondezirojn por vi, viaj familianoj kaj geamikoj.

Samideane via

Koran dankon! Mi ellegos ĝin plazure! Salutojn Elda
Kara Bardhyl,

Mi tre dankas pro la Bulteno.

Varmajn salutojn el konstante ankoraŭ malvarma kaj pluva Pollando

Sendas, Maĝosia, Pollando

Dankon, Bardhyl, pro via regula kaj ampleksa bulteno.

La frazo, kiun mi plej ŝatis en ĝi, estas la unua:

Albana Esperanto-Asocio estas jure agnoskita laŭ decido nr 3503 dato 15/02/2013 de la Juĝejo de Tirana.

Nun ni pluiru al la unua kunveno/kongreso de ĝi por klopodi starigi klubojn tra la lando kaj por klopodi informi pri la nova paĝaro de AEA la neesperantistajn albanojn.

Amike

Renato, Italio

Kara Bardhyl,

ankauh min atingis vialanda E-Bulteno! Gratulojn!

Certe, vi scias pri mia preteco E-instrui en Albanio (lahu sugesto de Renato Corsetti). Do, proksimighas mia feritempo, kiam mi povus tion efektiviĝi (dum unu monato: ekde fino de julio ĝis fino de aŭgusto). Mi estas profesia instruistino pri lingvoj en unu el rusiaj superaj lernejoj (instituto). Rilate al Esperanto, do mi instruis ĝin en kelkaj landoj de Euhropo (iama Ĉeĥoslovakio, Francio, Germanio) kaj Azio (Nepalo, Indonezio, Vjetnamio). Mi volonte instruos Esperanton (kaj eble samtempe la rusan?). Se tio interesas vin, mi ŝatus ricevi vian respondon ĉi-rilate.

Sincere, Tatjana Loskutova, Rusio

Respondo: Kara Tatiana, estas plezuro ricevi mesaĝon de vi, postkiam prof. Corsetti, ĉiam zorganta pri e-aferoj aparte en landoj malriĉaj kaj marĝenizitaj, sciigis nin pri via preteco instrui ankaŭ ĉe ni.

Estus tre bone havi vin en nia lando, despli instrui Esperanton kaj kial ne kontakti ankaŭ la kolegojn el la fremdlingva fakultato kaj mezlernejo tutnacia en Tirana.

Mia generacio (mi aĝas 68 jara) lernis la rusan ekde dekunua jaraĝo devige kiel la unuan fremdlingvon. Poste en gimnazio oni lernis duan fremdan lingvon, unue la anglan, poste la francan kaj pli malfrue la germanan, italan.

Niaj bibliotekoj plenplenis de ruslingvaj eldonaĵoj aparte pri la scienco kaj tekniko. Sed post la jaroj 70 oni ne plu atentis pri la rusa kaj la instruado de tiu lingvo draste reduktiĝis. Aktuale apenaŭ ekzistas antaŭuniversitata lernejo kie oni instruas la rusan. Mi bedaŭras je tio, sed tia estas ankaŭ la lingva politiko, kiu nun antaŭenigas ĉefe la anglan. En universitato oni plendas ke estas reduktita notinde ankaŭ la instruado de la franca, germana, hispana, itala ktp.

Post la liberaliziĝo de vizoj ankaŭ por albanoj, la gejunuloj ne plu atentis pri Esperanto. Sed ankaŭ la ŝtataj edukaj instancoj tute ne ebligas ties disvastiĝon. Ni baraktas sed la atingoj estas neimageble minimalaj.

Ni entreprenis preskaŭ dujaran kampanjon por enkonduki esperanton en universitatoj, kiel tio okazas en pluraj aliaj landoj enmonde kaj kio dignas por mem la universitatoj. Sed sensukcese. Nun ni estas laborante per aliaj strategioj, krom la propagando diversaforma, esperiga estas la tradukado en Esperanto de elstaraj verkoj albanaj. Lastjare ni promovigis la romanon Hunda Haŭto de Fatos Kongoli, la dua laŭvice post la verkisto Ismail Kadare vaste tradukita alilingven. Tion ebligis la pola samideano Tomasz Chmielik kiu venigis ĉi tien grupon de 15 polaj esperantistoj. Estis tre interesa semajno dum kiu ni aranĝis solenaĵojn en akademio de sciencoj en ministerio de kulturo, en diversaj TV kaj ĵurnaloj.

Ni planas ripetigi tion ĉar jam estas tradukitaj tri pliaj romanoj de Fatos kaj kvar romanoj de mem Ismail, same pluraj volumoj kun poeziaĵoj kaj noveloj de la albanaj verkistoj ankaŭ en Kosovo kaj Makedonio..

Eble ankaŭ vi povus alveni tiukaze kun la polaj esperantistoj kaj ĝuu iom nian landan etoson.

Do, ni ege deziras havi vin ĉi tie kiel e-instruanto sed ne havas gekursanojn pretaj por lerni. Se estonte ni certigos tion, ni volonte petus vin je tio.

Kara, jes mi klopodadis interligi niajn universitatojn kun AIS. Des pli ke kelkdekoj niaj studentoj balaŭriĝintaj ĉe ISTK Bydgoszcz, kiu kunlaboras kun AIS ankoraŭ ne certigis la agnoskon de siaj diplomoj ĉe ĉi tiu ministrio de edukado. Tio ege malesperigis ilin, sekve tute ne kunlaboras kun nia movado. Fakte ISTK ne ĝuis la statuson de alta lernejo, ĉar tiucele ĝi devus dungigi almenaŭ 8 profesorojn regulajn, kio maleblis pro manko de mono.. sed tio rezultigis la malagnoskon de la diplomoj en koncernaj landoj..

Du jaroj antaŭe ni entreprenis seriozan kampanjon por enkonduki esperanton en ŝtataj universitatoj kaj tiucele mi certigis moralan apogon far multaj profesoroj el diversaj landoj, kiuj alskribis leterojn al niaj universitatoj.

Sed nenia sukceso, nur respondo far fakultato de fremdlingvoj ke laŭ oficiala registara politiko nur la angla preferatas...

Poste mi provis fari tion ĉe la privataj universitatoj, denove sensukcese. laste mi tentis allogi universitatojn en Prishtina, Kosovo, sed ankoraŭ nenia reago..

Kion fari, krom daŭrigi esperige...

Certe ni bezonas kunlaboron ankaŭ kun vi. Ni restu en kontakto, amike Bardhyl

Ankoraŭ foje dankon, estu bonfarta!

Kiel ajn memoru ke en Albanio vi havos pliajn amikojn.

Ni restu en kontakto, via Bardhyl

Saluton, estimata Bardhyl!

Koran dankon pro la sendajho! jes, ghi ja estas interesa!

Dum la UK en Rejkjaviko mi devas raporti i.a. pri Albanio.

Mi perdis la fadenon, kio okazis pri la flugfolioj? Chu vi havas ilin? Chu vi bezonas pliajn ekzemplerojn?

Mi ekis la organizadon de nia (rumana) tutlanda E-renkontiĝo.

Mi resumos kion ni faras kutime, eble helpos vin pripensi la organizon similan che vi.

Mi iras al lernejoj, kiuj havas gastejon por la lernantoj. Dum la semajnfino ili liberigas kelkajn chambrojn, ni pagas modestan sumon (ne kiel en hotelo), eventuale en la manĝejo ili preparas manĝojn por ni (same malmultekoste). Ili ghojas, ĉar estas kroma eta enspezo por la lernejo.

En salono okazas la malfermo kaj en klaschambro - la simpozio, kurso ktp.

Posttagmeze ni promenas en la urbo kaj prezentas gravajn konstruajhojn, parkojn ktp.

Se eblas artistoj prezentas muzikon, dancojn.

En mia urbo mi organizas chu en lernejo, chu en la Universitato.

Kelkfoje mi mem pagis por kolego(j), kiuj ne povis pagi chiujn kostojn. Nun mi ne plu povas fari tion, sed vi ja havas monon en la konto Albanio, (Claud Nourmont enigis tien 300 EUR) kaj do vi povas pagi por la loghado, ekzemple.

Lau mi tre gravas, ke vi starigis oficialan asocion, sed nun ghi devas vivi, do vi devus elekti la estraron, kaj plani la landan agadon.

Kion vi opinias?

Amike,

Aurora, Rumanio


Nia propagando

Esperantistoj sen limoj

Esperantistoj sen limoj

Sukcesa prelego de Tatjana Loskutova

Mi ne konis ŝin antaŭ kelkaj monatoj. Prof. Renato Corsetti, la prizorganto de ĉiuj esperantistoj en la landoj relative malevoluintaj kaj marĝenitaj, kie ankaŭ la E-movado estas malforta, proponis nin la okazigon de E-lernokurso. La instruisto estus Tatjana Loskutova, universitata instruistino el Ivanovo, Rusio. Tatjana delonge gvidas E-lernokursojn kaj prelegas en la landoj foraj kaj iel forgesitaj, de Eŭropo ĝis Azio.



La rendezuo

Tatjana prelegas

la aŭditorio

Ni ne pretis por tiu propono, ĉar temis pri la somera sezono, nome aŭgusto, kiam preskauh chiuj feridas. Tamen ni pripensis la situacion alimaniere. Per letero ni sugestis al la direktoro de la Nacia biblioteko en Tirana aranĝi prelegon gvidata de Tajana por la kunlaborantoj kaj legantoj de

tiu chi biblioteko. La respondo, bonŝance, estis rapida kaj pozitiva. La direktoro komisiis al sia subulo pretigi kunvenejon kaj necesajn teknikajhojn.



Tatjana fotiĝas kun kelkaj junaj partoprenantoj

Tiel, la 2-an de aŭgusto, sekvan tagon post alveno de Tatjana en la albanan ĉefurbon tra longa vojo: Ivanovo-Moskvo-Istanbulo-Skopje- Tirana, tuto estis preta. Antaŭ la prelego, ŝi havis interesan rendezuon kun la s-ro Ylljet Aliĉka, konsilisto pri la eksteraj aferoj ĉe la Ministrejo de Kulturo. Interalie oni diskutis pri eblecoj de eldonado en Rusio verkojn de albanaj verkistoj.



Tatjana intervjuiĝas de novaĵ TV-stacio ABC news

Poste okazis akcepto ĉe la oficejo de la administrejo, fare de la vicdirektorino. Je la 11-a horo ni eniris en la salonon plenplenan kaj Tatjana tuj komencis sian prelegon, preparitan zorgeme. Dum ĉirkaŭ 80 minutoj ŝi prezentis panoramon pri Esperanto, ĝia naskiĝo, ĝia movado enmondo kaj en Albanio, ĝia kulturo (libroj, revuoj, muziko, filmoj).

La sesion filmis ankaŭ la privata novaĵTV-stacio ABC news, kiu fine intervjuis s-inon Tatjana.

Engjell Gusho

TV ABC NEWS komentas

Aktualaĵoj

Albanio membriĝas en la Monda Organizaĵo de Esperanto

Pliiĝas la pretendoj ke la lingvo instruiĝu en la lernejoj

02 aŭgusto 2013 19:13

Rigardu videofilmon pri tio:

http://www.youtube.com/watch?feature=player_embedded&v=8NsfxU6F1dY#at=11

La teksto en la albana sekvas kiel sube:



Al nederlanda bebo oni instruas Esperanton, la plej facilan lingvon en la mondo kiu ne apartenas al iu popolo. Ekzemplo, kiun la profesorino Tatjana Loskutova elmontras ankaŭ por rilaksigi la spektantojn, post la prelego sia en la Nacia Biblioteko.

Kiel reprezentantino de la Monda Organizaĵo de Esperanto, troviĝanta en Tirana, ŝi salutas la membriĝon de la albanaj esperantistoj. Ekde la 26-a de julio Albanio estas la 71-a membro ĝia. “Tio estas la unua paŝo grava de la albanaj esperantistoj. Mi gratulas ilin por tio kaj esperas ke ili faros aliajn paŝojn antaŭen.

Kiel membro, ili profitas de la helpo far la Monda Organizaĵo kiu kreas eblecojn por venigi ĉi tien instruistojn de Esperanto. Krome la membreco alportas ankaŭ la simpliĝon de la kontaktoj de la albanaj esperantistoj kun tiuj de la ceteraj landoj de la mondo”

La albana tradicio de esperanto apartenas ĉefe al la kultura cirklo kaj klerikuloj de Shkoder.

Personeco kiel Dom Lazer Shantoja estis membro de la mondaj esperantistaj organizaĵoj ekde la jaro 1905. Mark Kakarriqi kaj Mikel Koliqi estis en tiu vico. Cuk Simoni estas verkinta en esperanto historion de Skanderbeg.

La aktualaj pretendoj estas ke esperanto eniĝu en la edukaj programoj.

Tatjana Loskutova venas el Ivanovo de Rusio. Ĝuste la Carista Rusio estis la naskiĝlando de esperanto, kie, en la jaro 1887 Ludwig Zamenhov, hebrea okulisto el Bjalistoko, publikigis sian projekton pri la universala lingvo. Hodiaŭ, preskaŭ 3 milionoj esperantistoj parolas tiun lingvon en la mondo.

“Esperanton mi eklernis antaŭ ol eniri universitaton kaj tio malfermis la vojon per lerni la francan kaj la germanan, ĉar ĝi estas baza lingvo, simpla kaj flua, helpanta por lerni aliajn lingvojn fremdajn. Esperanto estas la mia lingvo de la pasio ankaŭ ĉar ĝi estas parto de la tradicio nia familia. Ni estas tri generacioj esperantistaj: mia patro, mi, kaj la edzo kaj mia filino.”

Esperanto estas unu el 100 lingvoj plej uzataj enmonde, el 6800 entute parolataj lingvoj. Ĝi uzatas kiel elektita lingvo en la sociaj retoj Google, Skype, Facebook. Ankaŭ la portebaj telefonoj hodiaŭ kun la tuŝebla ekrano, kapablas utiligi esperanton. Ĝi instruitas oficiale en la lernejoj kaj universitatoj en 28 landoj.

Loskutova donacis al la Nacia Biblioteko kelkaj librotitolojn en la lingvo esperanto kiel “Elektitaj Lirikoĵoj” de Puŝkin, pliriĉigante iel la kolekcion kun malmultaj titoloj didaktikaj kaj beletraj verkoj kiel la romano “Hunda Haŭto” de Fatos Kongol- Unua emblemo por la agado 126:

Albana lingvo (sq, Gjuha shqipe):

Dita e Esperantos - Më 26 korrik 2013 - Drejtësi gjuhësore

<http://www.linguistic-rights.org/bildoj/Dita-e-Esperantos--Me-26-korrik-2013--Drejtësi-gjuhesore---EsperantoTago-albana-42x59cm-72dpi.jpg>

mallonga adreso: <http://goo.gl/xJbxn>

Jen kiamaniere la brazilaj samideanoj propagandas IL en sia lando granda

Esperantistoj disvastigas Esperanton sur la monto Korkovado



SEM ANTE

Kunlabore kun la arto, kun la kulturo, kaj kun la komerco, Esperanto estas periode disvastigata.

Tiu disvastiga agado, jam estis farita per afiŝoj, fridujaj magnetoj, flugfolioj en poŝkestoj de la loĝantaro, kulturtenadoj, ĉe la historiaj monumentoj, en la ĉefaj turistejoj de la urbo Rio de Janeiro-Br, kaj dum eventoj rilate al la paco kaj al la kunfratiĝo inter la popoloj.

jaj *"Kiu disvastigas Esperanton, semas pacon en la mondo."*

Ankaŭ vi estu pli diligentaj disvastigantoj de la plej granda revo de D-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof.

Projekto ESPERANTO POR LA PUBLIKO

(Semante la noblan kaŭzon)
ekor.esperanto@yahoo.com.br






**"Semu Esperanton
en la koron de la infano kaj vi rimarkos,
kia bonega grundo ĝi estas!"**

(Semeie o Esperanto
no coração da criança e você observará
que ótimo solo ele tem!)


ZAMENHOF



Nia diligenta kolegaro
en laboro paca ne
laciĝos ĝis la bela sonĝo
de l'homaro
por eterna ben'
efektivigos.

MAHATMA GANDHI

M artiro ja plej granda,
A nimo plena je lumo,
H umila en siaj agoj
A fable instruis la veron
T iel same kiel Jesuo
M isiulo de la Kristo
A dmirinda oratoro,
G enio je servo de l' paco.
A gante altruiste,
N eŭtralis la malamon.
D ia homo el la steloj,
H odiaŭ ĉiela loĝanto,
I luminita saĝulo.



AKROSTIKO DE EVANDRO CABOCLLO

Ĉu eŭropanoj lernu Esperanton por blogi?

Diskuto de du pintaj anglalingvaj EU-blogantoj pri la tordiĝo en la debato, kiun kaŭzas la superrego de la angla lingvo kondukis al ekzota propono: esperantistoj kreu reton de blogoj pri EU-aferoj en Esperanto, kaj per pinta enhavo allogu la legantojn tien. Esperantistaj komentantoj trovas la ideon ne tute realisma.



Ronny Patz estas politika sciencisto, verkanta sian doktoran disertaĵon ĉe la Universitato de Potsdam. Li ankaŭ laboras en Bruselo ĉe la EU-oficejo de la kontraŭkoruptada organizaĵo Transparency International, kaj estas unu el la redaktoroj de la blogportalo Bloggingportal.eu.

En sia unua [blogaĵo de la jaro 2013](#) li daŭrigis diskuton komencitan de [alia bloganto](#) pri la problemoj kiujn kaŭzas la uzo de la angla kiel la ĉefa komuna lingvo en la blogado pri aferoj rilataj al Eŭropa Unio. La problemoj laŭ li temas ne nur pri tio, ke alilingvaj blogantoj restas fermitaj en siaj naciaj spacoj, sed ankaŭ pri tio, ke en la anglalingva blogosfero tro superregas diskutoj specifaj al anglalingvaj landoj - kiam temas pri EU, ĉefe tiuj pri Britio.

— La angla kiel komuna lingvo estas malbona. Se ni sukcesus silentigi la ripetigantajn pribritiajn debatojn, la angla estus bonega ilo por pli tuteŭropaj debatoj. Sed dum ni ne povas silentigi la britan debaton, ni estas kondamnitaj (notu: tio estas troigo). Do, mia intenco por 2013 estas: laŭeble ignori la britajn debatojn, ne disvastigi tiutemajn blogaĵojn en Bloggingportal.eu, kaj anstataŭe ligi al aliaj debatoj.

La temon baldaŭ kaptis alia [pinta bloganto, Mathew Lowry](#), kiu siatempe kreis la blogplatformon [BlogActiv.eu](#), kaj kiu jam en 2009 sekvis debatojn pri la ebla uzo de Esperanto kiel komuna lingvo en EU-rondoj.

— Tiam la ĝenerala sento laŭ mia memoro estis, ke la esperantistoj havis tre bonajn argumentojn favore al Esperanto kiel potenciala komuna lingvo por la reta publika sfero de EU. La problemoj estis, ke la angla kiel komuna lingvo havis, laŭ tiu trafa franca frazo 'le mérite d'exister' ("la meriton de ekzisto"), tiel ke Esperanto frontus malbonan cirkon kreitan de la reta efiko: "Kial mi lernu Esperanton por blogi pri Eŭropo? Neniu blogas pri Eŭropo en Esperanto, do mi havos nenion por legi. Kaj neniu kiu blogas pri Eŭropo parolas Esperanton, do ili ne povos legi miajn blogaĵojn!"

La solvo kiun Mathew Lowry nun proponas, estas ke la homoj kiuj jam scipovas Esperanton, la esperantistoj, kreu reton de esperantlingvaj blogoj pri EU-rilataj temoj, prefere almenaŭ unu blogon en ĉiu EU-lando. Tiaj blogoj laŭ li povus diskonigi la enlandajn politikajn debatojn al pli vastaj rondoj, kaj ili povus ankaŭ profiti unu de la alia, komparante paralelajn debatojn en ceteraj EU-landoj.

On Esperanto for the EU online public sphere
 Posted by Mathew Lowry on 07/01/13
 Tags: esperanto, multilingualism, public space

Ceci n'est pas une relaunch of this blog. It's just that Ronny's post ([How the dominance of English kills the European debate](#)) has been largely hijacked by Esperantists, and I need more space to react than that provided by Twitter.

The proper place for a debate about Esperanto in the EU online public sphere probably belongs on Joe Litobarski's posts on the subject in 2009, but he seems to have taken them offline.

Back then, the general feeling I remember was that the Esperantists made very good points in favour of Esperanto as a potential lingua franca for the EU online public

Mathew Lowry's Tag




— Tia iniciato povus malbridi tiujn multajn debatojn, kiuj potenciale ekzistas, kiel multaj kredas, sed kiuj ne ricevas la bezonatan oksigenon, ĉar la koncernatoj ne povas aŭ ne volas blogi en la angla. Neanglalingvaj blogantoj dise en EU povus trovi pli vastajn publikojn. Metablogoj povus elfosi similecojn aŭ diferencojn inter naciaj debatoj. Vera konversacio povus esti kreita pri tio, kiel debatoj pri EU-politiko diversas dise en Eŭropo, verŝajne unuafoje.

Tia evoluo laŭ Mathew Lowry povus konduki al sciencaj esploroj, konferencoj, kaj kompreneble doni al Esperanto la atenton de la pli larĝa publiko.

En la diskuto kiu poste okazis kaj okazas en la [blogo de Mathew Lowry](#) oni atentigis, ke la kreo de tia bloga reto kun altkvalita enhavo postulus enorman kvanton da homaj rimedoj, kiujn la esperantistoj ne havas. Krome, eĉ se tia kvalita bloga reto per ia miraklo estus kreita, ĝi tamen ne allogus multan intereson, ĉar homoj simple ne pretas lerni novan lingvon por legi novajn enhavojn, skribis Rubén Fernández Asensio.

— Vidu, la katalunan parolas 10 milionoj da homoj kaj ĝi havas elstaran literaturon kun historio de preskaŭ 1.000 jaroj. Tamen la ekstera mondo apenaŭ entute rekonas tiun riĉaĵon. Mi renkontis tre malmultajn homojn kiuj lernis fremdan lingvon nur por aliri la enhavojn troveblajn en tiu lingvo. La escepto estas la angla, kiun ĉiuj studas (kaj foje eĉ lernas) pro senespera sento de devo.

Libera Folio turnis sin al Toño del Barrio, kies komentoj de antaŭ tri jaroj estis la semo, kiu nun kondukis al la propono de Mathew Lowry. Li ne opinias la ideon ege realisma.

— Fakte, eĉ la blogoj ne spertas bonan epokon nun, kiam homoj pli emas aliri sociajn retojn. Mi dubas ke la iniciato havus kontinuecon. Krome, mi supozas ke estas sence ke blogantoj en iu lando reprezentus sian landon. Nu, mi certe esprimus miajn ideojn, ne tiujn de ĉiuj hispanianoj.

La plej riĉa el la malmultaj ekzistantaj esperantlingvaj blogoj pri EU-aferoj sendube estas tiu de [Eŭropa Civitano](#), kies aŭtoro longe restis anonima. Li fondis la blogon antaŭ unu jaro, en januaro 2012, kaj tiam ne volis, ke lia persona fono influu la percepton pri la enhavo.

— Estas fakto, ke iom mi kaŝis min, ĉar mi ĉiam pensis, ke estas grava la informo kaj ne mia persono. Memkompreneble mia nomo ne estas sekreto: Mi estas István Juhász, 45-jara viro el Hungario. Mi laboras kiel edukanto en infanhejmo, kie ni zorgas kaj edukas mense handikapitajn infanojn, kiuj pro diversaj kialoj ne povas vivi en siaj familioj.

István Juhász opinias la ideon de Mathew Lowry principe interesa, sed ankaŭ li ne trovas ĝin tute realisma.



— Unue, la establo kaj kunordigo de tiu reto de blogoj estus granda defio, ĉar la funkciigantoj de la diversaj esperantlingvaj retejoj kutime laboras senpage kaj tiu laboro bezonas sufiĉe multe da tempo kaj energio. Laŭ mia opinio estus relative malfacile trovi tiom da aktivuloj. Due, tiu reto postulus de la cetere ne tro aktivaj legantoj esplori 27 blogojn. Aliflanke, tiu reto de blogoj havus ne nur la taskon informi la legantojn kaj helpi la diskutojn, sed ankaŭ devus aktivigi la eŭropanojn kaj inter ili la esperantistaron, vekii ilian interesiĝon. Ĉar nun la malaktiveco estas la plej granda problemo.

En la blogo [Eŭropa Civitano](#), kiun István Juhász prizorgas sola, dum la pasinta jaro aperis 251 artikoloj, kaj ĝi laŭ li ricevas proksimume 350 vizitojn dum semajno.

— Povas esti, ke multaj esperantistoj simple ne scias pri la blogo.

Libera Folio: Kiel vi diskonigas viajn novajn blogaĵojn?

— Pri la aperintaj notoj regule ricevas sciigon la retlisto de Eŭropaj Federistoj, kies membroj tre multe helpis kaj helpas min per konsiloj, rimarkoj, komentoj kaj entuziasmigo, sed ĉiam tiel, ke mi povas resti sendependa. Por iom da tempo mi sendis sciigon ankaŭ al la retlisto "Eŭropo", sed kelkaj membroj de tio, ĝentile tamen firma-voĉe komunikis, ke tiujn ili ne bezonas. Memkompreneble mi respektas la peton kaj ne sendas pliajn sciigojn. La blogo havas propran paĝon ankaŭ en Facebook, ligilon en la paĝo de Eŭropaj Federistoj kaj estis menciita en *Eŭropa Bulteno* (Eŭropa Esperanto Unio) kaj ja, en *Libera Folio*.

István Juhász supozas, ke lian blogon regule sekvas kvindeko da personoj, ĉar tiom da homoj aperas ĉiutage por legi la novan blogaĵon. Por ke la propono de Mathew Lowry havu ajnan perspektivon, necesus multoble pli granda legantaro. La demando estas, kiom da homoj efektive pretus lerni Esperanton nur por povi legi blogaĵojn pri EU-politiko - kaj kiom da esperantistoj pretus kaj kapablu blogi en maniero kiu logus publikon. La temon pripensas Harri Laine en komento al la blogaĵo de Mathew Lowry:

— Malfacilaj demandoj por maldensa diasporo de homoj, el kiuj la plej multaj tute ne interesiĝas pri eŭropa politiko, des malpli emas diskuti ĝin en neŭtrala, ĵurnalisa maniero. Ho ve. Sed ĝuste en tiu maniero aferoj naskiĝas: oni metas la akvosemon en la pumpilon, oni kreas la eksplodeman sojlan mason. Ne pensu, ke tuj ekestos kunordigita reto de blogoj. Pensu pri etaj anguloj. Pensu pri tio, kiel iuj lingvoj naskiĝis, kun nur unu aktiva parolanto. Sed ni bezonas ankaŭ talenton, ne nur entuziasmon.

GRANDA SUKCESO DE VOCLAVAJ ESPERANTISTOJ EN ZŁOTORYJA (MALSUPRA SILEZIO EN POLLANDO)

La Esperanto-ekspozicio, kiu unuafoje estis prezentata en la Pola Senato pasintjare, finas sian turneon tra Malsupra Silezio.

La lasta etapo de la Esperanto-ekspozicio – la urbo Złotoryja

La 12an de junio 2013 je la 17a horo en la bela sidejo de la Societo de Amantoj de Złotoryja-Regiono (SAZR) okazis solena inaŭguro de la Esperanto-ekspozicio „125 jaroj de Esperanto”.

La Esperanto-ekspozicio el Vroclavo alvenis al Złotoryja jam la 3an de junio, kaj ekde tiu tago la urbanoj kaj lernantoj de lokaj lernejoj povis ĝin viziti. Złotoryja estas la lasta etapo de ĝia turneo tra Malsupra Silezio. Informojn pri la ekspozicio oni povis aŭdi pere de Radio Legnica aŭ legi ĉu en la loka, por tiu regiono grava gazeto „Echo Złotoryi”, ĉu en la retpaĝaro de SAZR. En la gravaj lokoj de la urbo estis pendigitaj informaj afiŝoj.

La inaŭguron ĉeestis lokaj gravuloj en la nombro ĉ. 60 personoj. Inter ili estis: Zenon Bernacki - prezidanto de la Distrikta Konsilantaro, Roman Gorzkowski - prezidanto de la Urba Konsilantaro, Roman Bajoński - urba sekretario, lernejestroj, bibliotekestro, direktoroj de diversaj organizaĵoj kaj la estraro kaj membroj de SAZR.

La alvenintajn gastojn kaj esperantistojn salutis kaj prezentis s-ino Danuta Sosa, estraranino de SAZR. Poste Małgosia Komarnicka preparolis mallonge la historion kaj ideon de Esperanto kaj la ekeston de la Esperanto-ekspozicio. Post ŝi Helena Biskup prezentis la monodramon „Doktoro Esperanto” de Mario Migliucci. Ŝi tiom bele kaj kortuŝe interpretis la monodramon, ke kelkaj personoj, dankante al ŝi, diris: „Aŭskultante vin, sinjorino, mi vidis bildojn, kiujn vi vorte priskribis”. Helena ofte aŭdas tiujn vortojn, kaj tio pruvas, ke la teksto kaj plenumo estas perfektaj.

La renkontiĝo enhavis ankaŭ muzikan akcenton, kaj tiu estis la prezentiĝo de Kamila Jasionowicz, lernantino de la gimnazio en Złotoryja, kiu gajnis la unuan premion en la kategorio „solisto” en la Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, okazinta la 17an de majo en Vroclavo. Kamila vekis aplaŭdon de la publiko kantante en Esperanto. Ŝi ne estas esperantistino, sed publike promesis lerni Esperanton.

Edward “Edulo” Wojtakowski finis la renkontiĝon per kelkaj vortoj pri Adam Pleśnar, la senkompara esperantisto, honora prezidanto de Silezia Esperanto-Asocio, kiu devenis el tiu regiono kaj mortis antaŭ du monatoj.

Dum la solena vespermanĝo, al kiu estis invititaj ankaŭ esperantistoj, ni diskutis pri Esperanto, pri la ideoj de Ludoviko Zamenhof kaj pri tio, kiamaniere disvastigi Esperanton. Ni ankaŭ konsideris, kiel utiligi la favoron de la ĉeestantoj de la renkontiĝo, inter kiuj troviĝis personoj, kiuj jam decidis lerni Esperanton.

Estiĝis multe da planoj, sed ankaŭ multaj akompanantaj ilin malfacilaĵoj. Ni ĝojis, ke povas organiziĝi Esperanto-kurso, sed samtempe ni ne scipovis respondi la demandojn: Kiu ĝin gvidos? Kiamaniere plenumi ĉi tiun taskon, se mankas bone edukitaj kaj diplomitaj instruistoj? En Złotoryja ne estas eĉ unu esperantisto, do kiamaniere profiti la sukceson de la renkontiĝo, sukceson, kiun atingis vroclavaj esperantistoj, prezentante Esperanton pere de la Esperanto-ekspozicio?

En ĉi tiu situacio malfacile estas kompreni, ke prof. Ilona Koutny, gvidantino de la tri-jaraj postdiplomaj interlingvistikaj studoj ĉe la Poznana Universitato Adam Mickiewicz, ĉiujare baraktas kontraŭ manko de studentoj. Ŝi eĉ havas problemojn varbi studentojn por unujara instruista trejnado, kvankam la studado kaj instruista trejnado kadre de la interlingvistikaj studoj estas perfekte preparitaj kaj prelegas en ili alte kvalifikitaj lekciistoj.

Ĝis nun mankis ankaŭ bona Esperanto-lernolibro. Edward Malewicz estas aŭtoro de la plej nova lernolibro, titolita „Sukceso per Esperanto”. Ĝi plenumas ĉiujn normojn de moderna lernolibro de fremda lingvo en la 21-a jarcento. En sistema kaj pripensita maniero ĝi instruas ĉiujn kvar lingvajn kapablojn: aŭskultadon kun kompreno, paroladon, legadon kun kompreno kaj skribadon. En Vroclavo dum Esperanto-kursoj la kursanoj testis ĉi tiun lernolibron, tuj ĝin akceptis kaj laŭdis. Bedaŭrinde, Silezia Esperanto-Asocio ne povas kolekti sufiĉan monsumon por eldoni ĝin.

Valoras utiligi ĉiun bonan ideon, ekz. la E-ekspozicion, kiun ĉiu Asocio povas mem prepari por informi pri Esperanto kaj por vigligi kunlaboron kun neesperantaj medioj, sed unue ni esperantistoj devas trovi respondon al la demandoj: Kial ni ne pligrandigas la liston de altdukitaj E-instruistoj? Kial ni konstante aplikas arkaikajn instrumentojn kaj uzas malnovmodajn lernolibrojn? Kial ni ne klopodas ŝanĝi la bildon de Esperanto kaj permesas, ke ĝi estu perceptata kiel eksmoda, malmoderna kreaĵo? La demandojn oni povas multoblige...

Małgosia Komarnicka, Pollando

Multajn belajn fotojn vi baldaŭ trovos en nia retpaĝaro: <http://esperanto.wroclaw.pl>

[Smail Grbo aŝiŝis en Esperanto](#)



[Smail Grbo](#) 12:05ptm jun 15

La artikolo el konata bosna gazeto "Oslobodjenje" ("Liberiĝo") en la bosna-serba-kroata lingvo pri mia gastado en Banja Luka (Respubliko Serba, BkH), kie mi prelegis pri Esperanto, pri miaj E-spertoj dum 50 jaroj, vojaĝoj tra Azio, ktp. Samtempe mi projekciis "Mia rondvojaĝo tra Azio per Esperanto" kaj ekspozicietis. La eventon aranĝis tiea E-klubo "La Mondo" kaj Mićo Vrhovac. Kaj mi mem ĝojas ke mi estis invitita, despli ĉar mi ne havis okazon tion organizi/fari en mia urbo Sarajevo. Mi menciis ke mi ankaŭ per ĉi tiu okazaĵo en Banja Luka prifresstis mian 50-jaran jubileon (vivo kun kaj por E.) kaj 125-jariĝon de nia lingvo. - Estu salutataj de Smailo el Sarajevo!

Saluton,

Baldaŭ komenciĝos nova internacia kurso, oficiale registrita de la universitato. Ĉu vi bonvolus plusendi la ĉi-suban anoncon? Dankon.

Amike

Maria Majerczak

Nova, superanivela kurso pri SKRIBADO en E-o - kun instruisto, en Interreto

Kiam vi skribas leteron, tekston por bulteno, blogo..., foje vi demandas vin, ĉu tio aŭ alio en ĝi estas lingve ĝusta, vi sentas bezonon de konsilo, revas pri iu, kiu estus proksime kaj helpus vin.

Estas tempo realigi vian malnovan revon. Nun tio eblas. Jen nova kurso, konceptita laŭ la bezonoj de tiuj, kiuj sentas sin ne tute certaj dum skribado en Esperanto.

ĜI UTILOS AL redaktantoj de bultenoj, retpaĝoj, al verkantoj, E-instruantoj kaj ĉiuj, kiuj deziras plibonigi diversajn aspektojn de sia verkado.

Kaj se vi mem ja ne sentas tiuspecan bezonon, eble... viaj konatoj aŭ eks-lernantoj bezonas helpon... La propono koncernas ankaŭ ASOCIOJN, kiuj bezonas lingve memstarajn aktivulojn.

PRI LA KURSO

Oficiala universitata kurso, okazanta vive, realtempe, en Interreto, kun sperta universitata instruistino.

Tempo: junio kaj sept. 2013 + 4 aliaj semajnoj, laŭ elekto. La lecionoj okazos 2-foje semajne. Planata komenco: 19 junio (la unua renkontiĝo).

ALIĜADO - ĝis la **18-a de junio**, ankaŭ post tiu dato, se daŭre disponeblas lokoj.

La kurso estas paga laŭ nealtaj, universitataj prezoj.

La HORO estas taŭga por esperantistoj el 5 KONTINENTOJ.

Pli da informoj: <https://docs.google.com/document/d/11tZd-r470uOjg1l5lwmkf9rkCwD-Ys5Tu7s8WctPTwQ/preview>

Se, studinte ĉiujn informojn, kiuj tie troviĝas, vi decidis ALIĜI, bv. skribi al: [esperanto.instruado.jag.univ.pl\(ĉe\)gmail\(punkto\)com](mailto:esperanto.instruado.jag.univ.pl(ĉe)gmail(punkto)com)

Kore invitas vin

Maria Majerczak

Gvidantino de Esperanto-instruado en Jagelona Universitato

La adreso, kiun bv. uzi: [esperanto.instruado.jag.univ.pl\(ĉe\)gmail\(punkto\)com](mailto:esperanto.instruado.jag.univ.pl(ĉe)gmail(punkto)com)

Beletraĵoj



Bedri Alimehmeti¹

Por "Kaza Rikordi"²

¹ Mia samgimnaziano dum la jaroj 1961-1963

² Casa Ricordi, itala muzikfilmo

Nenian koleron ni havis al la angla,
Des pli al la instruistino Afërdita,
Anĝelulino je la hararkrono kiel Dajti³ neĝo,
Kiu pli blankan ol ĝi havis sian spiriton.
Sed, la lecionhoron de la angla
Por “Kaza Rikordi” ni forlasis.
Kaprico de la aĝo.
Nenion pli.

La tuta lernejo skuiĝis.
Kvazaŭ tertremo estis fundamente ĝin svinginta.
Urĝa kunveno.
La Pedagogia Konsilio longe disputas.
“Fremda aperaĵo!
La geknaboj de la tria klaso
Forlasas la lecionon pro filmo!”

Oni nomas ĝin striko! Oh, kia frenezaĵo!
En mia kapo bolas la ĥoraĵo “Va pensiero!”
El la “Nabuko” de Verdi.
Pri kia striko temas!?
Kiel la ondegoj de monta vento
La furoro de la kritikoj alvenas en nia klaso.
Severa la “batalo” kun la magiaj sonoj
De la uverturo de “Norma” de Belini,
Okupinta niajn animojn.

Pardonu instruistino!
Estis tio nur adoleskanta kaprico.
La kompartia sekretario ululas:

³ Monto apud Tirana

“Vidu vidu, eĉ albane vi tion ne nomas “La Domo Rikordi”,
Sed itale “Kaza Rikordi”!
Tio estas la kulmino!”
Kulminas ja kaj haŭttremas.
La ario de Kavarados el “Toska” de Puĉini.
“La angla estas la plej disvastigita lingvo enmonde”.
La dolĉeco de la voĉo de instruistino Afërdita,
Mildigus ĉiujn tigrojn de la afrika ĝangalo.
“En la angla verkis Ŝekspiro, Dikensoj, Bajrono...”
Leĝera zefiro, dolĉe la klasspacon regas.
La ario de “Luĉia di Lamermur”.
Dankon majstro Doniceti.
Instruistino, ni ege amas vin.
Ne havis aferon kun vi.
Ne kun vi, nek kun la angla.
Eĉ tute vi ne pripensu tio.
Kial ni ne amu la lingvon de Presli,
Sinantra, Ĉiker, Braun, Gejner, Odis Red..⁴
Kies kanzonojn ni kantas ĉiutage.
Kaprico de la aĝo tio estis.
Nur tiome.
Nothing.⁵
Nenion pli.
Por ni vi estis kaj estas.
Ni kredas ke vi scias.
La plej bona instruistino.

⁴ Elstaraj usonaj kantistoj el la jaroj 60

⁵ Angle “nenio”

We love you and you love us”⁶

Aprilo 1962

⁶ Angle: ni amas vin kaj vi amas nin

Renkontiĝo post 50 jaroj



En la foto mi, Bardhyl, dekstre en la dua vico, dum meze kun griziĝintaj haroj, Bedri

Bedri Alimehmeti

Djevuška Simonova

Dum la sabataj posttagmezoj,

devige,

ni ne havas alian alternativon,

krom esti en la lernejo.

Birdoj, enfermitaj en la kaĝo.

Atendas nin la Karabino.

Kia rendezuo!

Rusa “djevuška”⁷,

Karabino Simonova en niaj manoj.

Kia malvarma!

Siberia malvarmo.

Haŭtremigas.

Kalibro 7.62 mm.

Minaca.Mortiga.

Tia estas la karabino,

“belulino” je naskiĝdato 1943,

⁷ Ruse- knabino

Deknaŭjara,

Kreitaĵo de la inĝeniero Sergej Simonov⁸.

Nenion komunan

Al la dolĉa Elena Bistrickaja⁹,

Des malpli al la aparta Izolta Izvickaja¹⁰,

Kaj neniel al la stelaro

De la neatingebla Tatjana Samojlova¹¹,

Eh! La steloj de la rusa kinejo

Por ni jam

Estingitaj kaj degelitaj

kvazaŭ la nebulo en la stepaj profundecoj,

Kune kun la amikeco al la sovetilando...

⁸ Rusa inĝeniero, la inventinto de la karabino Simonova

⁹ Rusa aktorino, ludas la rolon de Akcinja en la filmo “La Kvieta Dono”

¹⁰ Rusa aktorino ludanta Natalian en la filmo “La Kvieta Dono”

¹¹ Rusa aktorino famiĝinta pro la filmo “Migras la mevoj”

Nun ni rusojn ne amas,

Sed, je sorta ironio,

Iliajn armilojn ankoraŭ forte premas.

“La Karabino Simonova, sekura armilo

En la manoj de la soldato de la popola armeo”.

Ripetas je kelkan fojon

Per raŭka voĉo

La oficiro-instrukciisto

de nia sabata antaŭmilitista posttagmezo.

“Ĝi estas destinita

Por pereigi la vivajn fortojn de la malamiko...”

Absoluta silento.

“Per fajro, per kolbo kaj bajoneto”,

Ĝi has potence kaj samtempe nia voĉo.

Tiel, bravu ĉapajevoj!¹²

Teda laŭdo.

Nerva agaco.

Kiam finos

Tiu antaŭmilitista posttagmezo

Kaj ĉi tiu absurda rendezuo

Kun la makabra “djevuŝka”, karabino Simonova?

Post duonhoro,

¹²Ĉapajev- neklera komandanto rusa dum la Civila Milito. “Ĉapajev” uzatis kutime kiel esprimo de la militistoj de tiu tempo.

Sub la sonoj de la kanzonoj de Ĉelentano,

Modunjo, Mina, Pavone, Milva, Morandi..¹³

En la brakoj de unu la alia

Dancante,

Sub niajn piedoj, ni havas.

Senĉese piedpremas, piedpremas ilin...

1962

¹³ Elstaraj kantistoj italaj el la jaroj 60

Bedri Alimehmeti

“Vidaĵo el la Ponto” en Tirana

Kiom longaj ĉi tiuj lecionhoroj!

Senfina ĉi tiu antaŭtagmezo

Kiel ĉi tiu pluvofalo,

Kiu ankoraŭ pliigas la grizecon de Tirana.

Ni tute ne komfortas sur niaj benkoj.

La okuloj algapas

Trans la malsekiĝintaj tegmentaj kulmoj.

En la kinejo “!7 novembro”

Raf Valone ludas Edi Karbone-n.

“Vidaĵo el la Ponto” de Artur Miler

Estas trovinta la mian urbon.

Haŭtremiga historio,

Okazanta sub la ombro de la giganta “Bruklin”,

Kaj la brilo de la lumoj de “Broduejo”.

Historio de elmigrintoj,

Sparkigata

De la ama trembrilo

Inter Katerina kaj Rudolfo,

Kiuj vagadas ravitaj

Tra la trotuaroj de Broduejo.

Ridetas kaj interkisiĝas

Ĉe la aŭtomataj maŝinoj,

Kie post ĉiu monero ĵetita

Ili prenas enmane la dezirataĵon.

Tio igas nin streĉiĝi

Sur la veluraj sidlokoj de la loĝio,

dum aperas en nia menso;

la “dentoradoj”, “nigrakapuloj”, “kvarlekaj halvaĵoj”¹⁴

Strudeloj¹⁵, luksaĵo ja por ni.

Eh, niaj regaloj en la dolĉaĵejo “Peza”,

Per akumulita mono

Traserĉinte longe en la niaj poŝoj!

Entuziasmaj por tiu peco da Usono,

Por tiu peco da “Broduejo”,

Kiun hieraŭan vesperon en la sonĝo

Ŝajnis ke mi promenadis larĝlonge.

Por Raf Valone,

Simone Sinjorino, Ĵan Sorelo...

Ni hastis travivi denove

La njujorkan mondon.

Sed, la morgaŭon, en la filma celuloideo.

Bruklino ne plu ombris (!).

Ĉe Broduejo la lumoj estis malŝaltitaj (!).

La aŭtomatoj malaperintaj.

Mutiliĝo!

En la kotaĵo de la strateto kie ni alpaŝas,

Senfinaj spuroj.

Ĉefronte, en la riparejo

La lumo de iu sparkilo ĉiujn nin bluigas.

Kelkiu alvokas: “Ĉu kelkiu havas bileton?”

¹⁴ Malkaraj dolĉaĵoj

¹⁵ Relative kara dolĉaĵo

Mi emas ululi:

“This is not “A View from the Bridge”¹⁶

Sed “A View from my city”.¹⁷

¹⁶ Tio ne estas Vidaĵo el la Ponto

¹⁷ Vidaĵo el mia urbo



1963

Dritëro Agolli¹⁸

Titolo en originalo: “Lypësi i kohës”

¹⁸ Eksa prezidanto de la Ligo de Artistoj kaj verkistoj de Albanio

La tempoalmozulo

Tirana 1995

La eldonejo enciklopedia

La ĉevalino

La ĉevalino demandas ĉevalidon

Kaj alian virĉevalon ne havas

Graveda ĝi ne povas estiĝi

La poplon mordas per siaj dentoj.

La ĉevalino demandas ĉevalidon, sed la virĉevalo estas kastrita

Ĝi nur ties koksojn malsekigas per flusalivoj

La ĉevalino sian voston alten levas

Kiel fontanon.

La tempoalmozulo

De li foriris ĉio: tagoj, semajnoj, monatoj kaj jaroj.

Foriris tiel senkomprenite, kiel li preskaŭ ne sukcesis vidi

Estis siaj jaroj, kiam la homo ordonas, rondiriĝas kaj kreskiĝas

Sed ili foriris kaj li restis sen tempo kaj diras "jam estis tempo"!

Homo sen tempo, malplenigite de tempo havinte!

Esti sen tempo, pli povra ol la povruloj!

Neniu demandas vin kie iris, kie alvenis

Tiam vi fariĝas tempoalmozulo de la aliaj.

Mi nutriĝas kaj vivas, sed vivas kiel kadavron,

Dormas kaj vekigiĝas laŭ la instinkto kaj normo.

Tamen restis sen tempo, restis senforma estaĵo,

Se ni konsiderus la tempon formodimension.

Ekiri kaj reveno

Kiam mi ekiras vojon

Tuto brilas kaj esperas

Reveninte mi dormon sentas

Io en mia sino ekmortas.

La amopersekvito

Mi estas via prizonulo.

Mi vivas kun la katenoj kiun vi surmetis.

Sed strange, ne la kamero sufokigas min

Nek sufokigas min ankaŭ la ŝtopita fenestro.

Kiam vi la katenojn surĵetis en mian karnon.

Mi kisis viajn manojn.

Estas senprecedenta kazo, vi sciu

Ke la ekzekutiston mi kisas kaj amas!

Via erotika persekvito,

Porĉiame mi restu via persekvito!

Erotika bona aŭ malbona,

Ĵetu viajn manojn en mian gorĝon, turmentu min!

Ĉi tiu enprizoniĝo mi ne scias kiom longos.

Sed mi ege dezirus ke ĝi estu poreterna.

Tamen vi venu kiom ofte en la kamero.

Ĉar tio ja plaĉas al via persekvito..

Mi frenezigis, katenigu min

Mi frenezigis, katenigu min.

Ĉe la amikino venigu min.

Ŝi ja scias kaj sorĉas.

Per la pomoj en si.

Malligu min ĉe du pomoj.

Sur la amikino kuŝigu min.

Por ke ŝi turnu min sorĉe.

El frenezulo al homo.

Kun pastro en la taverno

En iu taverno tie en Romo,

La vento forĵetis min iufoje.

Amis la pastro Cicero-n.

Drinkis li la vinon latinece.

Kaj manĝante kaj drinkante,

Petis min ĉu mi estis katolikulo.

Sed trafis min patro vere bona.

Tial mi ne volis mi montriĝi maliculo.

Turnis mi al li milde kaj trankvile-trankvile

“Ĉi tiu vino estas kiel balsamo,

Tion deziras ĉiuj religioj.

Volas ankaŭ iu muslimo.

Miaj antaŭuloj estis katolikuloj,

La pli postaj estis bektaŝioj,

Kaj mi la lasta nenireligiulo.

Mi ne kredas je spiritoj kaj kandeloj.

Ĉar enuiĝis miaj avoj multe.

Ke oni ŝanĝis la religiecojn ĉiun jaron,

Tial mi povrulo rezignis je,

Ĉiu kredo kaj ĉiu dio...

Sed la pastro parolis tre malfrue,

Kaj eble tre hazarde,

Post kiam recitis Cicero-n

Post kiam murmuris latinece.

Sur la ties okuloj ekbrilis fajrero,

Tremetis kaj ĝisfine estingiĝis,

Kaj ridis libere kiel infanon,

“Pekaĵo ke vi ne estas katolikulo!”

Momente li forgesis pri Cicero,

Forgesis la aliajn, certe..

La granda pastro kun Dritero.

Drinkis la vinon latinece...

Poeto kaj animoj

Poeto vekas la dormemajn animojn,

Kaj la animoj ekstariĝas surpiede.

Poste turbulite kaj varmigite.

Poeton ili disŝiras per dentoj...

La sekretoj

Mi diros ĉion kion ne diris ĝustatempe,
Kiun ne volis diri, ne eblis, nek povis,
La ŝiritan bruston surtavoligas sur la antikva tablo,
Kaj vi rigardos kion entenis li en si.
Kiel sur la antaŭmanĝa telerego por vino aŭ brando.

Nepre la okulojn vi malfermos kiel bubalojn,
Kio estas ĉi homa brusto kiel la brusto de la granda
anaso en bankedo?
Kaj mi diros ke ne eltenu kaj ne suferu plu.
“Rigardu kion mi tenis kaŝe tiom da jaroj,
Enigu la forkojn kaj frandu se vi vere amas min!”

La deziro de vulpo

Iu vulpo volis turniĝi al homo,
Por mirigi la homojn per sia ruzeco,
Tial ĝi petis opinion ĉe la vulpoj,
Tiun pli maljunan enuigis la nigra novaĵo,
Kaj la animo ne povus elteni la ĉagrenon.

-Tuj oni malakceptu ties intencon,
Ĉar la vulpo, se en homon turniĝas, ni malaperos,
Ĝi konas niajn kutimojn de ekstremo al ekstremo,
Spionas nin kien iras kaj eniras,
Kaj la homoj kaptas nin unu post la alia.

Sed al la vulpo intencanta en homon turniĝu

Ŝajnis bagatelaĵoj la paroloj de maljunulino.

Kaj diris tute malŝate kaj ironie:

- Ehuuu, kiom da vulpoj estas en la sino de homoj, miaj fratinoj!..

Hiperbolo

Ah kiaj katoj estas en mia urbo,
Katoj pli belaj ol la virinoj!
Kiel pompaj sinjorinoj dormas tagiĝe
Lacigitaj pro la kvereloj ĉiunokte.

Kun Sankta Petro

En la pordo de la paradizo enue
Kun la bastono Sankta Petro atendos min.

- Kion vi volas ĉi tie kaj kiu vi estas.
Kun tia kuraĝo, tia fiereco kaj espero?

Kaj mi aldiros: - En la prozo kaj poezio,
Mi estas reviviginta animojn, sed ankaŭ estas infektinta
Apostolo Petro, ĝenerale
Mia pekaĵo estas tre komplika!

Sed mi estas poeto, estas alveninta al ĉi tiu sojlo,
Kun mi portas la pekojn en la tornistro,
Eklarmiĝos iome Sankta Petro maljuna
Kaj mi eniros pardonita en la Paradizon..

Nenio estas ripetebla

Nenio estas ripetebla same en la mondo.

La lastjara vintro deŝirita kun la dormema frunto,

Poluita pinĉita muŝo sur la fingropinto,

La ŝirita ŝuo dum ĝi ligitis apogate sur ŝtono,

Lacigita fabelo de la avo kaj la trenata psalmo de la pastro.

Nenio estas ripetebla same en la mondo,

La ŝvelita kverelo kun la malsana edzino en ĉambro kaj en la lito.

La nigra invado de la malpuraj blatoj en la banejo kaj kuirejo,

Raŭka kanzono de la virkoko sur la putrigita sterko en la vilaĝo.

La bleko de la skabieca azeno en la korto kaj paŝtejo.

Nenio estas ripetebla same en la mondo,

La ebriiĝo dum la idiota vespero senforma, pluva kaj venta,

Kaj la ĉielo plena je hieroglifoj sur la pratempa tero,

Nur unu kozo ripeteblas en la mondo de la grizaj zorgoj,

La morto dormanta sub vatkovrilo kune kun la homoj.

Post la ribeloj

Tiuj tondrantaj en la placoj,

Ne vesperiĝis herooj eĉ en la listoj

Tiuj subaŭskultantaj en la placoj

Tagiĝis ministroj..

Tio ja ne estas eĉ la unua miraklo,

Ne estos ĝi nek la deka miraklo,

Kion oni faru kun la povra historio.

Dancas kiel ĝi mem scias!

La lepora ponto

Leporo estis pasanta sur tabulo

Liginta bordojn sur sovaĝa torento

Dum ĝi iris komenci iom post iom alparoli

Al la restinta azeno sur la alia bordo.

- Kial ci lippendigis, frenezulo,

Mi starigis la ponton, kial ci ne pasas sur ĝi?

La azeno orependigis plorante

- Vi sinjoro leporo, estas pli azeneca ol mi!

Lepora ponto apenaŭ validas ankaŭ por la leporoj.

La espero de la poetoj

Mortos ĉiuj sanktuloj

Digelos ĉiuj profetoj

Perdiĝos ĉiuj oratoroj

Plurestos nur la poetoj

Tiel esperas la povruloj.

Mi estas koninta

Mi estas koninta centojn da mortintoj kaj milojn da vivuloj,

Centojn da mortintoj kun libroj kaj milojn da vivuloj kun paroloj

Centojn ku tomboj kaj ĉerkoj kaj milojn kun kavernaĉoj kaj ĉambroj

Barbuloj kun malpuraj haroj kaj knaboj kun freŝaj vangoj

Blinduloj kun okuloj plene de verukoj, idoloj kun lipoj plene de flusalivoj

Grasuloj kun pezaj manĝotabloj, mizeruloj dormintaj sen vespermanĝo

Mi estas koninta ŝtoncizistojn kaj poluantojn de la vorto

Mi estas vidinta kolumbidojn kaj anseridojn

Ĉiuj estas lasintaj ion ĉe mi, maliculoj kaj bonuloj

Tial la paradiza pordo estas por mi multe malfacila.

Poeziaĵo el Brazilo

(sendita de Alosio Sartorato)

La Perdita Generacio

hohoho!

mezuriĝas la valor'
en videbleco
ajna tipo de honor'
por mi taŭgas

kaj mi pretas
mi vere pretas
ja mi pretas
mi tute pretas
mi pretas je ĉia ajn perfido
por esti en la televido

amata estu la idol'
ni multaj vicas
dronu nin en akohol'
enŝlositaj

ĝis ni pretas
ni ĉiuj pretas
ja ni pretas
ni tute pretas
ni pretas je ĉia ajn perfido

por esti en la televido

je kio vi pretas por aspekti unika?!
je kio vi pretas por aspekti unika?!
je kio vi pretas por aspekti unika?!


pretas je ĉio por esti en televido
murdi panjon, vendi mian idon
partopreni stultludon kiel piramidon
forigi enhavon, nur prizorgi bildon
pretas je ĉio kaj eĉ pli ol
fanatikul' de nova religio
Vizaĝlibro donas vivsencon
Guglo, Jutub forigis penson
pretas je ĉio kaj eĉ pli da
lasi rete fotojn de mi nuda
vendi animon por minut' da glori'
esti sub lumo kun rid' kaj plori'
kaj se post tio daŭre ne sufiĉas
kaj se per tio mi daŭre ne famiĝas
metos sur parolistan gorĝon glavon
estas mi de la spektakl' nova sklavo

hohoho! ho ni pretas

Novaj libroj

Aperis “Lundo en sep tagoj” de Luljeta Lleshanaku

Juliofine aperis en Swidnik, Pollando la poeziaĵoj de Luljeta Lleshanaku. La Tradukinto: Tomasz Chmielik; reviziinto: Bardhyl Selimi; Kompostinto: Josip Pleadin.



Luljeta Lleshanaku
(1968)



Luljeta Lleshanaku naskiĝis la 2an de aprilo 1968 en Elbasan. Ŝia familio estis persekutata en la tempo de la diktatora regado de Enver Hoĝa. Infanajn jarojn kaj fruan junulecon ŝi pasigis eksterlande en malproksima, kurgista vilaĝo. Nur post la regobanko, en 1992, ŝi povis reveni al la ĉefurbo Tirana kaj ekstudii. En 1997 ŝi diplomigis pri la albanaj lingvo kaj literaturo en la Tirana Universitato. Ŝi komencis labori kiel redaktoro de la gazeto *Zëri i rinor* (Voko de ĵurnalisto), kaj poste redaktis la literaturan revuon *Drita* (Lumo). La unuajn poemojn ŝi publikigis en la 1990aj jaroj, kaj baldaŭ aperis en Tirana la poemaroj *Prekde poezie* (Prezinde poezio, 1990), *Qytë e shtrembura* (La urbo de lanatko, 1993), *Këmbëzat e së diellit* (Dimandaj sonoriloj, 1996), *Gjymnastikëzëm* (Duan-kubismo, 1997) kaj *Antipostumë* (1999). En 1999 ŝi partoprenis internacian atelieron por diverslandaj poetoj, kiam organizis, University of Iowa. Postkroho de tiu restado, dum kiu ŝi renkontiĝis kun literaturistoj kaj tradukistoj estis la anglalingva volumo *Prevoj*, eldonita en 2000, por kiu ŝi mem elektis siajn poemojn, skribitajn dum kvin jaroj inter 1992 kaj 1997.

67

La poemaro *Pulso e Venëthë* (Pulso meloĉo) aperis en 2000 en Prizreno, kaj unu jaron poste ricevis la premion Argjenta Plumo (Pende e Argendi), kiu estas prezigita honorigo de la albana ministere pri kulturo. En 2006 Luljeta Lleshanaku publikigis sian plej konstantan poemaron, tradukitan al multaj lingvoj, *Fenjëjt e natyrës* (Hajnoj de naturo). Septembro de 2009 oni distingas ŝin per la premio Kristal Vihore (poezia plej bona verkinto) dum la Internacia Libermano-Festivalo en Lublano (Slovenio). Tiu lasta poemaro estis tradukita kaj eldonita ankaŭ pollingve kaj troviĝis sin inter la tri unuaj verkoj de la 2a eldono de la premio Eŝopa Poeto de Libereco, kiu aligas la atestantojn de la urbo Gdansk, kie naskiĝis la movado Solidareco. La konkursojn partoprenis aŭtoroj el Ĉeĥio, Hispanio, Germanio, Norvegio, Turkio, Ukrainio kaj Pollando.

En 2010 ŝi skribis scenaron por la filmo *Mugaj*, kiu estis artistika debato de Petrus Vasi, konata religio-dokumentisto. Ŝi rakontas pri okazaj en la provinca urbeteto Gromani, dum la regim-Sano. Sani-feda protagonisto – dicitur plenumi la lastan volon de sia patro, kiu forlasis Albanion fine de la mondmilito kaj intencas enterigi la urmon kiu ĉiuj pokoj en la patrujo. Ĉiuj ĵurnoj traktas lin kiel fremdulo kaj ĉiel malhelpas. Krome la situacion de Sani komplikas la amo al la tiota Mira, kiu loĝas en la urbeteto, kun edzo kaj du infanoj.

Luljeta Lleshanaku loĝas en Tirana. Ŝi verkas kaj laboras kiel ĵurnalistino por gazetoj kaj televid-stacio.

Lundo en sep tagoj (Ĝi hana ne shtatë ditë) enhavas poemojn el la volumo *Fenjëjt e natyrës*, kiujn la aŭtorino dediĉas al siaj gepatroj kaj genoj, kiu admira je ŝia batalo por konservi homecon en la tempo, kiam individuo signifas nenion, sed estas multkole verŝi kaj trovi ĝin tie kruaĵon persekutitojn kaj terurajn de la paŭsteco. Luljeta Lleshanaku emojas kaj aliras internacian forton en ŝia homo estado, per kiu ŝi povas kontrastigi al la realo, serĝanta lin je ŝia espero kaj revoj. Fortula de proklamadoj kaj Dio, vegetarano en manĝejo kaj politika timo li alfrontadoj folioje la defeno, kiu estas sekura ekzamenito, ŝi li sekopos ne malperdi sian dignon. Geste ĉi tiu digno-ento horigis la amuzaro nenon al la ordinaro vivo, kiu estas granda granda poezio kaj malgrandaj ĵojoj, kun eterna ritmo de ankaŭ, ekanoj kaj forpaso. Kaj nur dum tiu datato, peristis, maldolera serido kaj defendado de la preĝo, anto, ŝia homo vere povis esti libera kaj savig.

68

Jen unu poeziaĵo en ĝi

Maniero por alproksimiĝi

(Mënyrë për t'u afruar)

Mi serĉas manieron por alproksimiĝi,

Ion, kion neniam antaŭe mi provis

Sen derompi almenaŭ spliteton de la sala skulptaĵo

Kun la vizaĝo turnita al mi.

Do, mi jam promesas nenion

Kaj ĉesis kredi

Je bela domo kun idilia nubo surkape.

Mi elektos la saman vojon, kiun mi forlasis iam,

Sekvante la spurojn de la ungegoj de urso

Sur la arbotrunkoj, kiujn ĝi ne povis grimpi.

Mi revenos, por daŭrigi la historion disrompitan

Kiel fulmo

Super la plugita tero.

Mi revenos tiel ordinare, ne donante al mi la tempon je
sana prudento,

Kiel masko senfende algluita al vizaĝo

Aŭ vintro al la tero, sufokante timon per la ventro.

Tibor Sekelj, Padma la eta dancistino

Estimataj, ni informas vin ke che la eldonejo "Grafokom" jhus aperis la nova libro de la fama esperantisto kaj mondvoĵaghanto Tibor Sekelj en Esperanto. Temas pri la porinfana romano "Padma, la eta dancistino", kies scenejo estas la hinda vilagho Kondapuro.

Jen kelkaj informoj pri la libro:

Formato: 16,5 x 20,5 cm

Paghoj: 80

Ilustrita (ilustristo esperantisto Tihomir Lovrić el Zagrebo)


Paghoj: kudritaj

Fortika bindo

Prezo: 9,00 euroj (en Kroatio 65,00 kunaoj) + 1,35 euroj por

sendokostoj (en Kroatio: 6,50 kunaoj)

Mendu che: grafokom@kc.htnet.hr



Pretpretas la eldono de "La sloganoj el ŝtonoj" de Ylljet Aliĉka

Tradukite de Tomasz Chmielik, provlegite de Istvan Ertl, reviziite de Bardhyl Selimi kaj kompostite de Josip Pleadin, pretpretas la eldonon cxi tagojn la novelaro "La Sloganoj el ŝtonoj de Ylljet Aliĉka.

Enkela Xhamaj

Jen la ĉefa novelo en la libro:



La Sloganoj el Ŝtono¹⁹

(Parullat me gurë)

Tuj post la studoj Andreo – kiel instruisto – ricevis la ordonon de laboro en forgesita montara vilaĝo en la nordo.

La patro silente akompanis lin ĝis la fervoja stacio. En la momento de adiaŭo, bridante kun peno sian kortuŝon, li admonis la filon: „Laboru bone, zorgu vi pri kaj atentu, ĉar la vivo estas malfacila”

Andreo venis al la loko vespere. La lernejo estis malgranda. Laboris tie dek instruistoj, ses el la najbara urbo, kaj unu instruistino el Tirana.

La sekvan tagon la plej aĝa instruisto, Paŝku, decidis tuj klarigi al Andreo, „kiel labori kaj vivi, ke vi estu rigardata favore”. Li komencis per la vilaĝa hierarkio: „- Plej grava estas la partia sekretario, instruisto Sabafi, post li la estro de la kooperativo.” Kiam li parolis pri la lernejestro, li prezentis tiun jene: „Honestulo. Lernantojn li batas tiel malofte, ke ili ne memoras pri tio. Sed kiam li batas, do ĝis sveno. Pli bone ne kontraŭstaru al li, ĉar de li dependas ĉio: la okuparo, via slogano...”

- Kiu slogano? – demandis Andreo.

- Nu, vi ne scias? – ekmiris Paŝku. – Ĉiu instruisto kun sia klaso aranĝas sloganon el ŝtonoj. Li respondecas pri ĝi dum la tuta tempo.

- Aha – murmuris Andrea.

- Ĉu vi pensas, ke estas tiel simple? – koleretis Paŝku.

- Ne, tute ne – mordetis sian langon Andrea. Laŭ liaj mirigitaj okuloj Paŝku vidis, ke li devos rakonti al li pri io, kio estas ja evidenta al ĉiu, kiel li pensis – li ne imagis, ke iu povas ne koni tion.

- Vi estas komencanto, vi staras antaŭ la kariero, do eksci: se vi volas esti bone vidata de la Partio kaj Aŭtoritatoj – suprenlevu la manikojn kaj kummetu bele vian sloganon. Por ke la slogano estu bela – daŭrigis Paŝku – vi devas esti diligenta. La sloganon ne malzorgu, almenaŭ unufoje en semajno vi devas rigardi ĝin, ĉar sufiĉas pluveto, ke perdiĝu la tuta efekto. Ŝtonoj estas traŝovataj, literojn kovras argilo kaj koto, kalkon forlavas akvo kaj aperas makuloj. Ĉu vi scias, kio okazis lastatempe?

- Ne – respondis Andrea.

¹⁹ Troviĝas en la libro “Tregime” eldonejo Toena Tirana 2009

- Ĉar de kie vi povus scii – diris Paŝku kaj li komencis rakonti pri la detruo de la slogano de instruisto Bafti. Jen kio okazis, laŭ Paŝku:

Bafti ĉiam estis laŭdata pro la belaj sloganoj kaj ĉiam oni sciis, kie li troviĝas: li estas ĉe la slogano kaj ordigas literojn. Li venadis tien pli kaj pli ofte, eĉ vespere – tamen subite, antaŭ kelkaj monatoj, la slogano komencis deŝoviĝi malsupren, kaj preskaŭ ses monatojn pasis, antaŭ ol ili malkovris la veron.

Kaj okazis tiel: paŝtisto de la kooperativaj ŝafinoj (unu el tiujn, kiujn oni elkulakigis, kondukis post tagiĝo ŝafinojn sur la herbejon kaj allogis ilin al la slogano de Bafti (tiumomente en la okuloj de Bafti aperis la sekreta brilo de la malkovrinto). „Diable, por kio la ŝafinoj bezonu mian sloganon?” – plendis Bafti kontraŭ la malfavora sorto, treege laca pro ĉiutaga ordigado de la slogano. Ke la ŝafinojn tentis la vortoj: *La plej danĝera malamiko estas tiu malamiko, pri kiu oni forgesas*, ĉi penso eĉ ne venis al lia kapo.

Bafti multfoje petis la lernejestron, ke li ŝanĝu la sloganon, „malsorĉu” ĝin, sed li ne intencis montri sian favoron.

Fine Bafti komencis dubis pri la „senkulpeco” de la ŝafinoj. Li atente rigardis la deklivon ĉirkaŭ la slogano kaj ĉiujn suspektojn konigis al la partia sekretario. „Strange – li pruvis – multaj ŝafinaj padoj kuras malproksime de mia slogano kaj estas eĉ pli oportunaj por la bestoj. Do, kial ili elektas tiujn ĉe la slogano? Ili ja ne havas tiom da kuraĝo, kiom la kaprinoj, ili malŝatas riskon”.

Por klarigi la aferon, helpis onidiroj, ke la paŝtisto komencis lastatempe aĉetadi en la vendejo pli multe da salo ol kutime. Do, li estis ruza vulpo – plenmane li prenis salon kaj allogis la ŝafinojn al ambaŭ vortoj „malamiko”, ke ili leku.

La suspektoj montriĝis pravaj – oni ja scias: la ŝafinoj ĉiam kuras stulte al salo. Tuj estis informita la regiona funkciulo de la polico kaj fulmrapide oni mobilizis grupon da volontuloj, ke tage kaj nokte ili gardu la sloganon de Bafti. Ekpensu: kampuloj sidis inter la arbustoj kaj dum horoj atendis ĝis venos la ŝafinoj kun la paŝtisto!

Longe sako alenon ne tenos, ĝi baldaŭ elvenos. Frumatene la kooperativaj ŝafinoj, detruantaj la literojn, kiujn penege kunmetis Bafti kaj liaj lernantoj, estis kaptitaj de gardistoj ĉe la faro. La kampuloj sin ĵetis sur la paŝtiston (laŭ signo de tiu regiona funkciulo de la polico) kaj faligis lin.

La paŝtisto neadis ĉion, li kriis, ke li ne kulpas, ke nur la spuroj de la ŝafinoj estis kvazaŭ trovitaj ĉe la slogano, ke finfine la bestoj laŭleĝe havas nenian respondecon kaj similajn stultaĵojn – sed jam du, tri tagojn poste oni senmaskigis lin antaŭ la laboranta popolo kaj arestis pro malamika agado, kvankam ĝis la lasta momento li provis defendi sin.

Poste la lernejestro ŝanĝis por Bafti la sloganon kaj la monteton. Li donis unu el tiuj, kiuj enhavas la vorton „Gloron” aŭ „Vivu”. Pri tiaj sloganoj, kompreneble, ne estas multe da laboro. Cetere ili ĉiam aktualas. Krome – Paŝku mallaŭtigis sian voĉon – ne gravas la enhavo de slogano, sed ĝia longeco. En la momento, kiam li ricevas sloganon, li komencas instinkte kalkuli literojn.

Per ĉi tiu okazaĵo Paŝku finis sian paroladon pri la estonta kariero de Andreo.

Du tagojn poste la lernejestro vokis Andreon, konigis al li la devojn de edukisto, montris la okuparon kaj donis aliajn taskojn. Kiam ili venis al la slogano, li diris:

- Vi estas novulo, do vi ricevos lokon proksime al la lernejo. – Koncerne la enhavon, hmm – li malfermis sian ruĝan notlibron, hezitis dum momento kaj aldonis - vi povas elekti. Restis al mi du sloganoj: *La Partio – estas armilo de la laborista klaso* kaj *For la imperiismo*.

Andreo, jam konante la aferon, balbutis nekuraĝe:

- Mi preferus la sloganon pri la imperiismo.

- Tre bone – la direktoro ne obstiniĝis. – Ĝuste tio estos facila. Pri ĉi tiu loko okupiĝis antaŭe Forok, do ĝi estas tretita per la piedoj, sed Forok baldaŭ emeritiĝos, havas pli kaj pli malmulte da fortoj, la aĝo kadukigas lin, vi komprenas. Nu, sukceson – li finis.

Sekvatage post la lecionoj Andreo iris kun lernantoj al sia loko. Ili marŝis preskaŭ duonhoron. La tereno estis ebenigita, sed la ĝisnuna slogano prezentiĝis mizere. Sed li ankoraŭ trovis iom da loko por la nova slogano.

Kiam li dividis literojn, la infanoj kverelis laŭte. Laŭ sia propra kalkulo pri la nombro da ŝtonoj bezonataj por meti ĉiun signon, ili klopodis akiri la literon – se eble – malpleje lacigan. Unue la kaŭzo por la kvereloj estis „i”, poste „l”, „r” kaj tiel plu

Surprizita per la tumulto, Andreo demandis por esti justa: „Kaj kiel disdonadis literojn instruisto Forokj?”

- Aĥ, diversmaniere, unue laŭ la nomlisto, poste la pli facilajn literojn li donis al la knabinoj, kaj punktojn super „i” aŭ komojn al la malsanuloj,

- Sed ankaŭ tio okazadis laŭ ŝato – aŭdiĝis iu voĉo.

- Do, ni jam finu tiel, kiel ni komencis – diris Andreo. – Ankaŭ mi metos unu literon.

- Ne, sinjoro instruisto – oponis la lernantoj – pli bone gardu la ordon.

Poste ĉio okazis glate. Ili finis post tri horoj, trotetante inter arbustoj kaj ŝtonoj kiel malpigraj abeletz. Finfine la lernantoj mem rekonis, ke la slogano0 estas bela.

Lacaj, ili disiris ĉien, kun sakoj kaj iloj sur la ŝultroj, laŭvice kriante al Andreo: „Ĝis la revido, sinjoro instruisto!” Li sentis premon en la gorĝo, kiam li vidis ilin malsatajn, en mizera vesto, sed feliĉajn. Sendube eĉ ne unu lernanto komprenis – aŭ ne provis kompreni – la signifon de la slogano.

Andreo malrapide revenis hejmen, laca, sed kvieta, kun la sento de la bone plenumita devo. Li falis sur la liton kaj ekdormis ŝtone.

Matene li renkontis aliajn instruistojn, Neniu aludis sloganon.

Poste li vidis, kiel pigre, kun jakoj ekjetitaj sur la ŝultroj kaj kun cigaredoj buŝangule, ili kviete pretigis sin al la foriro, parolante: „Mi ankoraŭ rigardos mian sloganon”. Tiel prezentiĝis iliaj distroj. „Ĉar, efektive, kion alian oni povus fari en ĉi truaĉo?” – pensis ofte Andreo.

Poste ankaŭ li al kutimiĝis al tio, ke almenaŭ unufoje en semajno li vizitadis la sloganon. Li purigis ĝin de folioj, polvo kaj koto, plibonigis iun literon, ripozis momenton apude kaj salutis kampulojn revenantajn post laboro.

Malpli ol kvin monatojn poste estis ŝanĝita la slogano de Andreo Kaj ĝuste oni ŝanĝis la sloganojn al plej multaj el la instruistoj.

Paŝku klarigis, ke la ŝanĝo de la sloganoj ne okazadis tiel ofte, la Partia Komitato faris tion laŭ strikte observataj kriterioj. Disponigante sloganojn ĝi konsideris multajn faktorojn, kiel la politika konsisto de la aŭtoritatoj en la distrikto, provinco aŭ regiono, la nombro da kulakoj, internigitoj, ordinaraj kaj politikaj malliberuloj, la nombro da komunistoj, la grado de la ekonomia progreso de regiono, la rikolto-kvanto da vintra greno, la nivelo de la batalo kontraŭ parazitaj en la agrokulturo, la historiaj-kulturaj tradicioj de distrikto aŭ la eksterordinara situacio en regiono. Ekzemple oni rakontis, ke kiam foje la lernejestro kaj instruistino kun dubinda biografio estis kaptitaj sen aliaj personoj en la ĉambro, la regionaj aŭtoritatoj tuj decidis ŝanĝi la sloganon: *Vivu la proleta internaciismo al Gardemo, gardemo, ĉiam gardemo kaj Plifirmigi la proletan moralon.*

Kutime la divido de la sloganoj estis la lasta punkto dum la kunsido de la pedagoga konsilio, sed la instruistoj plej ofte divenis, ĉu okazos la nova divido aŭ ne. Ĉar unu tagon pli frue sekretario Sabafi estis vokata al la Partia Komitato, kaj kiam li revenadis, plej bone estis teniĝi malproksime – li sidis rigida kaj morna kun sento de la tuta politika respondeco.

Sabafi bonege sentis la scivolon de la instruistoj, dezirantaj – kiel eble plej rapide - ekkoni la enhavon de nova slogano. Fierege li salutis ilin dekstre kaj maldekstre, kaj tiam – pli ofte ol kutime – ili invitis lin al sia domo. Multaj enviadis tion al Sabafi.

Ĉi-foje la direktoro klarigis, ke la ŝanĝo de la sloganoj okazas pro la atendata vizito de membro de la Politburoo en iu urbo norde kaj pro la veturo de lia aŭtomobilo proksime al ilia vilaĝo.

Dum la divido de la sloganoj malkaŝe sentiĝis ekscito kaj streĉo inter la instruistoj. Ĉar la longeco kaj enhavo de slogano decidis la sencon de ilia plua vivo: montris simpatian aŭ malsimpatian de la gvidorganoj.

La direktoro mallaŭte legis la nomon de instruisto, kaj poste la sloganon. En la klasĉambro fojfoje estis aŭdeblaj suspiroj de plifaciliĝo aŭ sufokataj krioj de teruro.

La streĉo montriĝis post la slogano de Diana, instruistino el Tirana, kiun Andreo preskaŭ ne konis. Ili renkontiĝis du aŭ tri fojojn sur la ŝoseo, atendante, post semajno da laboro en la lernejo, „okazon” por veni al la ĉefurbo. Tial ke la ŝoforoj ĉiam preferis kunpreni junajn knabinojn, Andrea kutime ankoraŭ longe staradis post la forveturo de Diana, ofte ne ĝisatendante alian kamionon. Senfervore li revenadis al la vilaĝo, kaj la sekvan tagon pasigis ĉe la slogano.

Oni ne scias kial, sed la direktoro malamamis Dianan. Tio fariĝis evidenta, kiam li donis al ŝi la kilometran sloganon: *Ni turniĝu al la montaro kaj montetoj, ni faru tie fruktodonajn kampojn.* Sed ĉi-foje la slogano havis sesdek du literojn kaj estis jena: *Oni devas pensi, estas necese labori, oni devas vivi, same kiel revoluciuloj.*

Pro kolerego tremis la lipoj de Diana. Ŝi volis ekregi sin, sed ne povis. Finfine ŝi eksplodis:

- Mi sciis, dekomence mi sciis!

- Kion vi sciis, kamaradino? – senemocie demandis la direktoro.

- Mi ne deziras tion, kamarado direktoro! Kiom longe vi traktos min tiel?! Estas malhoneste turmenti min per sloganoj kaj mi ne scias, ankoraŭ per kio!

Pro furiozo rompiĝis la voĉo de Diana. Ĉiuj instruistoj sidis rigidaj. Neniu kuraĝis aŭdigi eĉ vorteton.

La direktoro – kvazaŭ nenio estus okazinta – daŭrigis sen konfuzo:

- Mi ne komprenas vin. Vere mi ne komprenas. Kie vi vidas turmentadon? Kaj eble vi havas ion kontraŭ la slogano? – li eklekis subite. – Estas la sama slogano, kiun kamarado Enver diris en la 7a Kongreso.

La efekto estis paraliza. Sen kaŝi malaman rigardon, Diana silentiĝis, ne kuraĝante paroli. La instruistoj strabe rigardis ŝin kun kompatato.

La silenton interrompis Gjini, modestega instruisto. Balbute kaj kun tremantaj manoj li proponis la solvon, kiu povus malfortigi streĉon:

- Kamarado direktoro, ĉu mi povus interŝanĝi mian sloganon *Marsi kun la tempo-spirito* al la slogano de Diana?

- Ne, decide ne – malpermesis la direktoro. – Ni ne sidos ĉi tie la tutan tagon kaj interŝanĝados sloganojn laŭplaĉe! La sloganoj estas politika devo, kaj se iu havas ion kontraŭ metado de la sloganoj, ni parolos alie – li finis.

Elirante post la kunsido, Andreo aŭdis, kiel Gjini flustris al Diana: „Ne ĉagreniĝu, ne koleru. Mi iros kaj faros vian sloganon, ĉu bone? Unu aŭ du fojn mi revenos hejmen pli malfrue kaj la fino! Aŭ iun posttagmezon ni iros kaj metos ĝin kune, ĉu vi volas...?”

Sed dronante en pensoj, Diana ne aŭskultis lin.

„Ho, kiel belega ŝi estas!” – pensis Andreo, vidante ŝian suferplenan vizaĝon.

Li ricevis la sloganon *Ju pli forta estas la Proleta Diktaturo, des pli fortas la Socialisma Demokratio.* Li ne teruriĝis pro ĝia longeco. Li eĉ sentis alfluan de energio, kiam li aŭdis la opinion de la direktoro:

- Andreo, viaj sloganoj bone impresis min, bravulo!

- Dankon – ekĝojis Andreo.

Du jarojn li zorgadis pri la sama slogano. Li vizitadis ĝin ofte, kaj kiam semajnfine li ne volis sidi hejme kaj sentis la solecon, ĝi servis al li kiel la lasta savilo. „Gloron al Dio, ke mi ĝin havas! Se ne tio, kion mi povus fari en ĉi tiu dezereto?” – li pensis dum purigado kaj polurado de la ŝtonoj.

Iun aŭtunan tagon, kiam sur la malplena ludoplaco ĉe la lernejo li fumis cigaredon, li renkontiĝis kiun Diana.

- Kion vi faras? – li demandis.

- Nenion – ŝi respondis.

- Bela vetero – li rimarkis.

- Jes.

- Do, ni iru al la sloganoj.

- Kiucele? – li aŭdis. – Delonge ne pluvis.

- Kaj folioj... Folioj povis fali sur ilin?... Cetere, kiel vi volas.

- Bone – ŝi konsentis sen fervoro.

Malrapide ili iris sur la pado.

Ĉe la torento, kiel la vojeto disbranĉiĝis, Diana prenis akvon en la polmojn, malsekigis sian vizaĝon kaj harojn, denove ŝi ĉerpis akvon kaj ŝprucigis la vizaĝon de Andreo. Li estis konfuzita. Diana ekridis kore, sed li rapide trankviliĝis kaj faris la samon. Tiam ŝi ankoraŭfoje ŝprucigis lin per akvo kaj forkuris.

Ne estis necese ludi malsaĝulon, Andreo kuraĝiĝis, ĉerpis akvon per ambaŭ polmoj, kuris post ŝi, atingis la knabinon ĉe la arbo, respiris profunde kaj ŝprucigis. De la ŝultroj de Diana la akvo fluis malsupren, la malseka robo kelkloke algluiĝis al la korpo. Nemulte pensante Andrea ĉirkaŭprenis ŝian kolon kaj alpremis ŝin forte kiel infanon.

Sed la knabino elglitis kaj siblegis:

- Ne!

- Kial ne? – li elbalbutis, kaptante spiron.

- Ĉar mi ne volas – ŝi respondis kaj foriris malrapide al sia slogano sur la monteto.

„Kial, diable, ŝi min ŝprucigis per akvo, se ŝi ne volas?” – ekĝemetis Andreo kaj ĉagrenite li trenis siajn piedojn en direkto al sia slogano. Efektive la ŝtonoj estis puraj, ili konservis eĉ la freŝan blankon de kalko, tie kaj ĉi tie kuŝis nur kelkaj sekaj folioj. Li kolektis ilin kaj ne sciante, kion plu fari, li ekiris sur la monteton de Diana.

Li ekmiris vidante, ke ŝi sidas apud la sloganon *Oni devas pensi, estas necese labori, oni devas vivi, same kiel revoluciuloj*, superŝutitan per folioj.

Ŝi estis kvazaŭ spiritforesta. La robo ankoraŭ ne sekiĝis.

Li eksidis apude kaj diris pente:

- Mi petas vian pardonon.

- Pro kio? – ŝi demandis.

- Pro tio, kio okazis.

- Ah, mi preskaŭ forgesis.

- Kial vi ne forprenos la foliojn? – li demandis.

- Tiel ĝi plaĉas al mi pli multe: tuta en folioj, kaj ne tia blanka, kiel en malsanulejo. Kun folioj estas pli romantike, ĉu ne? – Diana impresis, ke ŝi parolas al si. – Kvazaŭ ĝi esprimus alion kaj estus la revolucia-romantika slogano.

- Revolucia romantiko... - murmuris Andreo kaj ambaŭ ekridis. – Malgraŭ tio ni devos ordigi ĝin – li konstatis kaj komencis forbalai la foliojn.

Diana observis ĝin el sub la duone mallevitaj palpebroj. Post momento ŝi ekstaris, malrapide alproksimiĝis, forĵetis hastmove folion kaj delikate tuŝis la manon de Andreo.

Li ne reagis. Li estis laboranta kun mallevita kapo.

Tiam ŝi kunpremis lian manon, rigardis en la okulojn, kaptis la kapon per ambaŭ polmoj, turnis kaj subite kisis lin.

Ili falis sur la molan teron, inter la vortoj „kiel” kaj „revoluciuloj”. Ili ne rimarkis, ke en la vorto „revoluciuloj” ili detruis unu literon per siaj impetaj piedmovoj.

Al la vilaĝo ili revenis malfrue vespere.

Sekvatage unu salutis la alian indifere, kvazaŭ nenio estus okazinta. Sed de tiam ili vizitadis pli ofte siajn sloganojn.

La monotonecon de la vilaĝa vivo interrompis la okazaĵo kun Lleshi, plej aĝa instruisto, laboranta en la malgranda, unuklasa filio de la lernejo de Andreo, en vilaĝo atingebla post du horoj da marŝado ĝis la kooperativa centro. Laŭlege la direktoro devis vizitadi ĉi lernejon du fojon en jaro. Sed ĉar ĝi troviĝis malproksime, li venadis tien pli kaj pli malofte.

La katastrofo okazis dum la lasta kontrolo, kiam en iu forlasita ravino, proksime al la lernejo de Lleshi, la direktoro – kun mirego – trovis la sloganon *Vjetnamo venkos*.

Li staris rigida. Jam preskaŭ dek jarojn Vjetnamo estis libera! Sed – pli malbone – la slogano estis tre bone zorgata, eĉ kun videblaj freŝaj kalko-spuroj.

Komence la direktoro ne sciis, kion fari. Li ŝatis Lleshion, des pli ke ili ludadis kune ŝakon. Lleshi mem distingiĝis per granda sindonemo al la devoj kaj ne apartenis al tiuj, kiuj ŝercemas. Tamen li ne povos elturniĝi senpune. Ĉar la direktoro estus akuzita pro la manko de gardemo.

Do, en la plej baldaŭa kunsido la direktoro diris, ke al la taga ordo li aldonos la aferon de Lleshi.

En la tago de la kunsido Lleshi venis du horojn pli frue. Estis malagrabla rigardi, kiam – flava kiel vakso – li fumis cigaredon post cigaredo, devigante sin al kvieto kaj kolegeco.

En iu momento li vokis al la instruistoj sur la ludejo:

- Sinjoroj, delonge ni ne ludis – eble ni aranĝu ŝakokonkurson?

Paŝku rigardis lin kompateme kaj diris:

- Lleshi, kiu nun pensus pri la ŝakludo?

- Vi vidis, Paŝku, se ni ludos, mi venkos plene – Lleshi ridis laŭte.

Sed neniu el la instruistoj ekridis.

Dum la kunsido – ĝis la momento, kiam estos pritraktita la afero de la slogano pri Vjetnamo – ĉiuj aŭdis, kiel la piedo de Lleshi mallaŭte frapfrapas la benkon. Li havis malfacilajn momentojn. Li jam al kutimiĝis al senĉesa laŭdado, kaj hodiaŭ ne okazos same.

La direktoro prezentis la aferon mallonge. Ŝajnis, ke li volas pritrakti ĝin laŭ formala maniero. Vortavare li rakontis pri la okazaĵo, kaj poste li petis Lleshion:

- Diru, kiel tio okazis?

- Kio okazis? – Lleshi ekmiregis.

Silentiĝis. Lleshi ekstaris kaj mallerte serĉis ion en la poŝoj. La ceteraj kun atento observis liajn movojn. Finfine Lleshi elprenis ĉifitan paperfolion kaj tiam klariĝis, ke li pretigis sian parolon skribe.

Li kroĉis la okulojn al la paperfolio, sed ne povis elbuŝigi vorton. Pro aflikto li ne komprenis, ke li tenas ĝin rerturnita. Gjini, kiu sidis apude, flustris:

- Streĉu vian atenton, Lleshi, rigardu, kiel vi tenas la folion!

- Ah, dankon, Gjini – suspiris Lleshi kaj ĉirkaŭrigardante li komencis:

- Kamaradoj...

Li ne diris eĉ la sekvan vorton, ĉar la direktoro interrompis al li:

- Ho, neee, Lleshki, ni ja ne bezonas ĉi tie grandajn disputojn! Rakontu, kiel okazis pri tiu slogano kaj ni finos la kunsidon!

Oni devus nur kompati Lleshion. Liaj okuloj kun malhelaj ombroj sube montris, kiom longe li penigis sin, por skribi ĉi parolon. Sed ĉiuj volis – kiel eble plej rapide – fini la kunsidon, do Lleshi miksante vortojn klopodis mallonge rakonti ĉion.

Laŭ li – tro fervora partia sekretario kun la nomo Nik obstiniĝis antaŭ multaj jaroj, ke sloganoj estu metataj eĉ en la plej foraj lokoj. „Kie estas nur eble”, li diradis. „Tie, kie oni vidas ilin kaj kie ili ne estas videblaj”.

Lleshi ricevis la sloganon pri Vjetnamo kaj pretigis ĝin laŭ ĉiuj reguloj. Baldaŭ poste ĝi estis forgesita kaj neniu diris al Lleshi, ke li ĉesu okupiĝi pri la slogano, do ĉiusemajne, post la lecionoj, kun lernantoj aŭ sola, li zorgadi tiel, ke ĝi aspektu plej freŝe.

- Nu, bone, sed Vjetnamo delonge estas libera! – kriis Sabafi.

- Ili ja donis al mi tiun sloganon kaj mi ripetas: neniu diris, ke mi ĉesu zorgadi pri ĝi – malcedis Lleshi, konvinkita pri la propra senkulpeco.

La plua diskuto ne havis sencon. Oni povis riproĉi al Lleshi nur la malbonan konon de la internacia situacio.

- Kion oni povus atendi de li? – flustris Paŝku al Andreo.

Sed kiam la direktoro, fermanta la kunsidon, diris senintence, ke al Lleshi mankis „la ĝusta engaĝiĝo en observadon de la aktuala internacia situacio”, tiu respondis tuj:

- Mi ne akceptas viajn vortojn! Se mi bone scias, al Vjetnamo kroĉadis sin kaj plu kroĉiĝas la kapitalismaj landoj.

- Jes, kompreneble – murmuris la direktoro, kolera, ke li tuŝis ĉi temon., - Rapide forigu la sloganon kaj estos la fino por la tuta afero.

La instruistoj skuadis la kapon jese al la direktoro, kolektis siajn aĵojn kaj pretigis sin al foriro, jam sentante, ke li elturniĝis senpune, ne cedis tiel facile.

- Kun via permeso, kamarado direktoro! – li leviĝis kaj daŭrigis kun interna fervoro: - Kamaradoj, mi klopodis labori honeste, gardi la sloganon kiel necese kaj...

- Ho, ne, Lleshi – la direktoro tute perdis sian paciencon – neniu dubas pri via honesteco! Forprenante la sloganon neniu punas vin, sed komprenu: ĝi estas malktuala de jaroj!

- Bone – plivigliĝis Lleshi – donu al mi unu el tiuj, pri kiuj oni diras aktualaj.

- Kion mi donu al vi?! – la direktoro muĝis de furiozo. – Kiun sloganon mi donu por tiu merda truaĉo?!

Tiam Lleshi – konvinkita, ke la direktoro volas ekscii, kiu slogano estas bezonata – deklamis:

- Nu, kiun? *Jankioj, la manojn for de Vjetnamo.*

La instruistoj elbuŝigis la kolerplenan „hooo”, kaj la direktoro – sentante, ke li havas nenian ŝancon daŭrigi la seriozan kunsidon – tuj fermis ĝin.

La instruistoj saltleviĝis, rapidante al la pordo. Lleshi eliris kiel la lasta. Silente li elprenis cigaredon, bruligis ĝin malrapide kaj profunde enspirinte fumon li elflustris: „Mi jam estas perdita”

La novaĵo, ke Lleshi ne ricevis sloganon, hastis fulmrapide tra lia vilaĝo.

La edzino de Lleshi, Maria, sidis de tiam kun acida mieno kaj teniĝis malproksime de siaj koleginoj el la brigado.

Kelkajn tagojn poste amikino demandis ŝin kompateme:

- Ĉu tio, kion babilas ĉe ni homoj, estas vero?

- Pri kio vi pensas?

- Ni aŭdis, ke al via edzo, Lleshi... (mi pardonpetas, tiel ni aŭdis) – estis forprenita la slogano. Tio signifas, ke li restis sen ajna slogano.

Maria hontigite mallevis la kapon.

- Jes – ŝi respondis – tio estas vero kaj mi diros al vi sincere, ke mi ne ĉagreniĝas tiom pri ia slogano, kiom pri Lleshi. Ni perdis la tutan kvieton. Li ne dormas, nek manĝas – eĉ pri niaj infanoj li ne zorgadis tiel, kiel pri tiu slogano.

La amikino provis konsoli ŝin.

- Ne ĉagreniĝu, okazos nenio granda. Li forigu ĉi sloganon kun tiu ŝtato – (kiel ĝi nomiĝas? Tio elflugis el mia kapo) – li iom sidu hejme sen slogano, kaj kiam ĉio estos forgesita, li povos skribi peti novan sloganon.

- Vi pravas – konsentis Maria – la tuta zorgo estas en tio, ke li perdis ĉian fervoron kaj nenio lin ĝojigas. Li estas rompita per tiu ĉi afero. Li ne al kutimiĝis al kritiko.

Tiam la amikino diris ion, kio mirigis la tutan brigadon:

- Por sankta kvieto li elpensu sloganon kaj metu ĝin kaŝe, sur la propran korton – tiun kun Vjetnamo aŭ iun alian. La infanojn vi havas grandajn, ili helpos vin kaj zorgados pri via slogano.

Maria estis konsternita.

- Ĉu kaŝe? – ŝi demandis.

- Kial ne? – insistis la aliaj koleginoj.

Ĉu Lleshi obeis al iliaj konsiloj – oni ne scias. Estas nur certe, ke neniam poste li petis novan sloganon.

Du semajnojn post tiu okazaĵo la direktoro kun Sabafi vokis Andreon en la kabineton kaj diris metante la manon sur lian ŝultron.

- Nun vi ricevos ion eksterordinaran. Ĉu vi vidas la muron de la tenejo sur la monteto? Malbelan kaj tiel malplenan, ke ĝi frapas ĉies okulojn? Kune kun kamarado Sabafi mi decidis, ke oni devus tie pentri oleofarbe grandan sloganon.

Sabafi kapjesis.

- Vi devos fari tion sola, ĉar al la lernantoj oni malpermesas tian laboron. Vi ricevos eskalojn, penikojn kaj farbojn. La slogano estas jena: *Vivu la diktaturo de la proletaro*.

Andreo akceptis sian taskon kviete. Sed forironte el la kabineto, li turniĝis kaj demandis ĝentile:

- En kiu koloro estu la slogano?

La direktoro ridetis malice kaj strabante Sabafion li respondis:

- Memkompreneble, Andreo. En la ruĝa.

La tenejo estis griza, polvoplena domaĉo. El ĝiaj muroj elstaris kelkloke grandaj, dikaj kaj akraj ŝtonoj. Andreo ne veturis por dimanĉo al Tirana kaj laboris du tagojn senĉese: sabate posttagmeze li komencis mezuri la muron, kaj dimanĉe li pentris literojn per minio (la ruĝan oleofarbon li ne trovis en la magazeno). Dum li estis pentranta, la likvaĵon ensorbis fendetoj en la muro, la literoj perdiĝis sur malebenaj ŝtonoj, la malnova stukajo defalis post tuŝoj de la peniko. Andreo ne antaŭvidis tiajn malfacilaĵojn.

- Sukceson, instruisto Andreo – de tempo al tempo salutadis lin knaboj. – Tre bele ĝi prezentiĝas.

- Dankon! – li respondadis sur la eskalo, laboregante obstine, polvokovrita kaj farboŝmirita de la plandoj ĝis la kapo.

Marta, estrino de la brigado por maizo-kulturado, gradika belulino, konsilis:

- Atentu pri viaj manoj, instruisto Andreo! Se la farbo difektos ilin, vi ne plaĉos al la knabinoj en la ĉefurbo.

Andreo sincere ridis pro la ŝerco.

Vespere li rekonis, ke la slogano ne prezentiĝas kiel necese. Por la antaŭa slogano, sur la monteto, li povis ebenigi la teron. Ĉi tie, pri la muroj de la tenejo, nenio estis farebla.

Li finis pentri malfrue, nekontenta pri sia laboro. Li havis malbonan antaŭsenton – kaj li ne eraris.

Du tagojn poste, la direktoro kaj Sabafi alvokis lin urĝe.

- Pro kio vi fuŝis ĝin tiel, Andreo? Vi alarmis la tutan distrikton – eksplodis la direktoro (oni diradis, ke en furiozo li ne estas bridebla)

- Kial? – Andreo demandis feblavoĉe.

- Nu, „kial?!“ – La direktoro ne sciis, kiel montri sian furiozon antaŭ Sabafi. – Per kio vi skribis la sloganon, per la manoj ĉu piedoj? – li strabis al Sabafi, kvazaŭ demande: „Kion ni faros pri li?”

Sed la vizaĝo de Sabafi estis rigida. La afero prezentiĝis multe pli aĉe ol malbone.

Andreo provis ekscii, kio vere okazis. Oni diris tion al li poste: estis la kontrolo de la sekretario pri aferoj de la propagando en la distrikto kaj kiam li kontrolis ĉiujn sloganojn el ŝtonoj, lia rigardo sin kroĉis al la slogano sur la muro de la tenejo. Li alproksimiĝis, silentis kvin minutojn kaj poste – kribrante la vortojn – li demandis Sabafion: „Kiu ĝin skribis?”

- Andreo! - li rapidis kun la respondo. – La instruisto de biologio, el Tirana, kamarado sekretario.

La sekretario revenis al la oficejo de la kooperativo, parolante eĉ ne vorton. Ĉiuj, kiuj sekvis lin, pensis, ke li forĝis pri la tuta afero. Sed tuj poste, kiam li eniris la ĉambiron de la partia organizaĵo, li turniĝis kaj post momento da peza silento, eklekis: „La slogano estis skribita sen konvena engaĝiĝo!”

La aludo estis klara.

Por Andreo venis nun tagoj da plena soleco. La instruistoj interparolis kun li malvarme. Sabafi evitadis lin.

Du tagojn poste Andreo estis vokita al la partia organizaĵo. La ĉefan riproĉon faris Sabafi, kiu serĉante ĝustajn, kaj ankaŭ trafajn esprimojn, komencis la diskuton jene:

- Kamarado Andreo, la partia organizaĵo volus ekscii, kio estis la kaŭzo aŭ prefere *realaj faktoroj*, kiuj puŝis vin, inklinitis aŭ – ni tion diru klare – *instigis* al tio, por skribi aŭ – dirante pli klare: *fusi*, do skribaĉi *Vivu la diktaturo de proleta ro?* Ni diru malkaŝe. Mi volus, ke vi klarigu al la organizaĵo honeste, *kiu staras post tio*.

Ekregis la tomba silento.

Andreo komenis paroli: kulpas ia malbona speco de ŝtonoj, malpuraĵo sur la muro de la tenejo, malnova stuko...

- Nu-nu – fulmrapide interrompis Sabafi. – Nebona stuko, nebona tio, nebona alio, tiamaniere mni finos neniam!

- Do, kion, laŭ via opinio, kamarado Sabafi? – demandis Andreo miri-gite.

- Vi ekscios ĝustatempe – kribis la vortojn Sabafi. – Sed estus pli bone, ke vi mem diru tion. La partia organizaĵo ne havas tro multe da tempo, por okupiĝi pri tiaj aferoj, bona knabo. Mi pensis, ke vi malfermos antaŭ ni la koron, kaj poste vi prezentos la principan memkritikon, sed mi vidas, ke tio ne okazos. Do, kamaradoj – li ektusetis kaj per la voĉo unu tonon pli laŭta daŭrigis – estas tro malmulte dirite, ke Andreo pentris la sloganon sen engaĝiĝo kaj ne tro kontenta pri la diktaturo de la proletaro. Tun ĉi aferon ni traktu pli atente. – Nun Sabafi nallonge analizis la klasbatalon, kaj poste diris:

- La ĉefa kaŭzo estu serĉata en la biografioj de parencoj de Andreo kaj rilatoj inter liaj familianoj dum la milito: unu onklo mortigis sin, la alian oni internigis, kaj Andreo mem... Ĉu vi ne vidas, kamaradoj-komunistoj, kiel ruze la malamiko – jes, la klasa malamiko! – provas sin kaŝi antaŭ la Partio, kiu bonvoleme donis al li sian helpan manon, por eltiri lin el tiu marĉo? Kaj li ne deziris tion.

Andreo ne komprenis, kio okazas. Li estis konscia nur pri tio, ke ĉi tie decidiĝas liaj vivo kaj sorto.

- Haltu, kamarado – unu el la komunistoj-veteranoj, konata pri la sento de justeco, interrompis al Sabafi. – Ni jam ne troigu. Sendube la instruisto kulpas, sed ne tiom multe, por nomi lin klasa malamiko. Mi konsilus iom malardigi vian fervoron.

Andreo jam ne sekvis tion, kion ili parolis. Fine ili petis, ke li forlasu la kunsidon, ĉar ili devos fari decidon. Pli-malpli unu horon poste eliris la ĉambron Sabafi kaj komunikis senemocie: „La partia organizaĵo decidis, ke ankoraŭ ĉi-foje vi ne estos punita. Nur ses monatojn da reedukado en produkta brigado”.

- Mi dankas vin – diris malvarme Andreo.

Li estis sendita al laboro en la brigado de Marta. La kampuloj akceptis lin malfideme. Li laboris pene kaj poste, kiam li revenis hejmen, li falegis elĉerpita sur la liton, kiel ŝtupo.

De tempo al tempo li devis legi gazetojn por la brigadanoj.

Marta traktis lin bone. Ŝi ofte ŝercadis pri liaj manoj delikataj „kiel ĉe infano”. Iun tagon ŝi eksidis apud li, kiam li tagmanĝis solece, kaj diris:

- Posttagmeze vi laboros ĉe la maizo-rikolto sur la kampo antaŭ la monteto. Se vi bezonas helpon, mi helpos al vi.

- Dankon – koleretis Andreo. – Mi ne bezonas vian helpon.

- Hooo – ekridis Marta – vi ne volas iom labori kun mi? – ŝiaj dikaj mamoj ŝanceliĝis.

Andreo rigardis volupte.

Posttagmeze ŝi trovis lin inter altaj kreskaĵoj, kie li deŝiris foliojn de la maizaj spadikoj. Ŝi ankaŭ komencis fari tion. Poste, sen vortoj, li ĉirkaŭprenis ŝin kaj ili falis en koton. Des pli ili malpurigis sin, ĉar ekpluvis.

Ili revenis kaŝe tra krepusko, sur la maizkampoj, ĉiu en sia direkto. De malproksime bojis hundoj. Andreo havis veston malsekan ĝis la lasta fadeno.

Post ses monatoj Andreo revenis al la lernejo. La direktoro akceptis lin bone, kvazaŭ nenio estus okazinta. Li diris al li novan sloganon kaj kiam Andreo turniĝis forironte li aldonis:

- Mi forgesus, Andreo: lastatempe kelkaj instruistoj, tiuj malpigraj, anstataŭ naturajn ŝtonojn komencis uzadi por la sloganoj blankajn brikojn. Laŭdire tio devus pligrandigi estetikajn valorojn, sed praktike nur senmoraligis lernantojn. Ili komencis ŝteladi brikojn el la konstruejo, ĉiutage oni vidis, ke ili ŝtelas kaj venas al la lernejo kun tornistro sur unu kaj kun sako da brikoj sur la alia ŝultro. Kompreneble la Distrikta Partia Komitato tuj kontraŭstariĝis, sed – parolante sincere – tio senigis la sloganojn je la naturaj originaleco kaj spontaneco, kun kiuj la nacio esprimas proprajn opiniojn uzante tiucele lokajn rimedojn aŭ – dirite per aliaj vortoj – tion, kio falos en la manojn...

Andreo kaj la direktoro rigardis unu al la alia en la okulojn.

- Vi pravas, kamarado direktoro – afable respondis Andreo. – Mi atentis pri tio.

Kaj kiam li eliris malantaŭ la pordon, li komencis kalkuli enpense literojn de sia nova slogano.

Nia historio



Bardhyl, Enkela, Rita



Ibrahim, Enkela, Rita, Gafur, Bardhyl

En la foto, Gafur Muço, la unua prezidanto de la albana esperanto-organizo, Rita Permeti, aktivisto de la movado, Enkela Xhamaj esperatistino poetino, Bardhyl Selimi kaj Ibrahim Xhamaj, 20 jarojn antaŭe.

Turismo



Tra Albanio kun la francaj samideanoj



Pol kaj Mirej en la albana Riviero

Mapo de Albanio

Antaŭ du jaroj mi prelegis en Alzaso pri mia lando invitive de la loka e-asocio, estrata de s-ro Edmund. Eble tio instigis la samideanan paron Pol kaj Mirej esprimi la deziron viziti ĉi tiun malgranda landon de Balkanio. Ili anticipe pluesploris pri la lando per gvidlibroj en la franca, mapoj, artikoloj.

Finfine ili alvenis la 18-an de junio 2013 kaj restis ĉi tie ĝis la 1-a de Julio 2013. Certe ili mem verkos reportaĝon pri sia vojaĝo kiu sendube estos tre interesa. Mi nun notos la turojn kaj kelkajn momentojn de ilia riĉa ekskurso, aldonante ankaŭ fotojn faritajn de Mirej mem. Eble ĉi raporto instigos ankaŭ aliajn samideanojn viziti mian patron..



ĉe beктаŝioj en Tirana ties ĉefsidejo karakteriza domo en Tirana, ortodoksa nova granda katedralo

La paro akomodiĝis en Freddy's hostel, situanta nur 200 m for de la placo "Skanderbeg", la urbocentro, kaj tiome ankaŭ de mia hejmo. Kontraŭ 20 eŭroj po nokto entute por dulita ĉambro ili ĝuis duŝejon, TV, aerkondiĉilon, interreton kaj simplan matenmanĝon kun kafo.


Malgraŭ la longa vojaĝo ekde ilia hejmo al Tirana (per trajno, du aviadiloj kun tranokto apud Parizo, preskaŭ sendorme) Mirej kaj Pol aspektis tute freŝaj por tuj entrepreni la unuan konadon de la ĉefurbo, tutan posttagmezon. Post longa promenado tra la bulvaroj, ni kafopaŭzis sur la teraso de iu pluretaĝa domo en la tiel nomata "Bloko", aparta kvartalo iam loĝata ekskluzive de la altaj kompartiaj kaj ŝtataj gvidantoj komunistaj.



Rondiranta kafejo sur la pinto de pluretaĝa domo Parko en Tirana

Naĝejoj

Ni vizitis ankaŭ tri ĉefajn preĝejojn: moskeon, katedralon katolikan kaj katedralon ortodoksan. Vespere mi invitis ilin en mia hejmo por modesta manĝo.



En la montaro

Karakterizaj domoj en Berat

Artur tostas

La morgaŭon matene ni kune vizitis la Nacian Historian Muzeon kaj la alerion de la pentroarto .



Muzeo

La pavilono de Patrino Tereza

Parko en Tirana

Posttagmeze ni “flugis” per telfero al la monto Dajti, ĉe kies piedoj kuŝas mem Tirana. Estis tre agrable tie, aparte en unu el la hotelrestoracioj nomata “La Akvofonto de la Feino (Albane: Gurra e Perrisë), kie oni estis konstruinta kelkajn laŭterase sinsekvajn fiŝajn akvorezervejojn. La freŝeco de la aero, la virga kaj densa arbaro, naturaj panoramoj, forigis de ni ian ajn lacecon kaj kapdoloron.



La Akvofonto de Feino
Berat



Telfero



Kvartalo en la muzea urbo de Berat

Ĵaŭde estis antaŭplanita vizito en la Ministerio de Kulturo kie nin renkontis la s-ro Ylljet Aliĉka, eksa albana ambasadoro en Parizo, nun konsilanto pri la eksteraj rilatoj. Ylljet proponis al Pol enesperantigi sian lastan romanon “Rakontoj pri internaciuloj”, laŭ rekomendo de samideano Tomasz Chmielik el Pollando, kiu jam estas tradukinte en Esperanto “La Sloganoj-n” - rakontaron de Ylljet. Estis amika konversacio en la franca, albana kaj Esperanto.



La kastelo de Berat



La mirinda valo de Valbona

Por la posttagmezo mi proponis al la francaj amikoj viziti ankaŭ alian religian institucion unikan, la mondan ĉefsidejon (ĉefavejo) de la beктаŝioj kiu troviĝas en Tirana ekde la jaro 1929, post kiam la tiama prezidento de la reformita Turkio, Kemal Ataturk, ne plu permesis ĝin en sia lando.

Revene ni haltis por vizito ĉe la hejmo de la samideano Shaban Hasani.



Bardhyl kaj Pol en Tirana
Butrint



La lago de Butrint



Arkeologiaj fosadoj en

Pol kaj Mirej vojaĝis al Kruja (albana ĉefurbo dum XV jc) kaj Durrës kun kafopaŭzo en la kasteleto de Preza. Dum la tuta periodo ilin veturigis la taksio ŝoforita de Artur, tre lerta kaj agrabla viro, parolanta iomete la italan, la anglan kaj rakontanta amuzajn anekdotojn. Krome li bone konis la landon kaj estis ankaŭ ia ĉiĉerono je mia manko.



La amfiteatro de Durrës
Durrës



La vojo al la Riviero



La marhaveno de

La sabaton la amikoj dediĉis tute al la ekskurso al Berat, 2400 jaraĝa urbo sub la protekto de UNESCO.



La kastelo



Karakteriza domo en Kruja



Tra la stratoj de Gjirokaster

Dimanĉe okazis la enlandaj ĝeneralaj balotoj. Tial mi lasis niajn amikojn liberajn. Dum la posttagmezo ni kune ekskursis al la kasteleto de Petrela sude de la urbo, Ĉikaze ni "provis" ankaŭ ambaŭ tunelojn novajn de la aŭtoŝoseo al Elbasan kaj esploris la naturon ĉirkaŭe. Revene kafopaŭzis en la artisma risorto KAME ĉe la bordoj de rivereto, apud la vilaĝo IBA.



La tuneloj de Krraba



La kastelo en Elbasan



La urbo Pogradec

La unuaj tagoj estis ia preparo por la longaj turekskursoj. Lunde kaj marde Pol kaj Mirej entreprenis dutagan ekskurson al Sudo laŭ itinero:

Tirana- Durrës- Apollonia (antikva urbo kiun laŭdas ankaŭ Cicero)- Karavasta (vasta marlaguno)- Ardenica (renoma monaĥejo sur la monteto)- Vlora (grava marhaveno kaj turisma urbo)- Llogara

(nacia parko je alteco pli ol 1000 metroj)- Riviero (longa roka marbordo kun mirindaj plaĝoj en la Jonia maro)- Saranda (marhaveno kaj turisma urbo, tranokto tie)- Butrint (antikva urbo sub protekto de UNESCO, fondita de Enea de Trojo)- kasteleto de Lëkuras- Gjirokastra (muzea urbo sub la protekto de UNESCO)- Tepelena- Tirana.



Ardenica
Butrint



Jonia maro



Amfiteatro de

Malgraŭ ĉirkaŭ 700 km da vojaĝo denove niaj amikoj aspektis tute senlacaj!



Marhaveno de Durrës



Muzeo en Kruja



Ĝardeno en Elbasan

Sekvis alia dutaga ekskurso orienten laŭ la itinero:

Tirana- Elbasan- Librazhd- Prrenjas- Pogradec (ĉelaga turisma urbo, trankokto tie)- Dilon (mirinda parko ĉe la fontoj de la lago de Ohrid)- Tushemisht (vilaĝo turisma ĉe la landlimo kun Makedonio, interalie famiĝinta pro la unika fiŝo Koran kaj ties bredejoj)- Sankta Naumo (renoma monaĥejo aparteninta al Albanio antaŭ la jaro 1925, nun en Makedonio),- Maliq- Korça- Voskopoja (nacia montara parko kaj antikva urbo)- Tirana.



Lago de Pogradec-Ohrid



Saranda



Bajram Curr

Por iom "relaksiĝi", la 28-an de junio, vendrede, ni planis unutagan ekskurson al nordokcidento laŭ la itinero:

Tirana- Lezha (antikva urbo)- Shëngjin (marhavena turisma urbo)- Shkodër (antikva urbo- centro de la iliraj ŝtatoj antaŭ pli ol 2400 jaroj)- Shirokë (ĉelaga pitoreska turisma vilaĝo)- Tirana.



La parko de "Blua Okulo"

Muzeo etnografia en Kruja

Antikva katedralo en Butrint

Restis du tagoj por esplori la nordorientan parton kaj Kosovon. Tiel ni sekvis la itineron:

Tirana- Kukës (urbo ĉe la landlima, famiĝinta dum la milito en Kosovo 1998-1999 pro la fakto ke ĝi akceptis ĉiutage 120 000 rifuĝinton albanajn forpelitaj de la polico kaj armeo serba)- Prizeren (historia urbo en Kosovo)- Gjakovë (alia urbo en Kosovo)- Bajram Curr (ekstremnorda urbo en Albanio, tranokto tie)- Valbona (mirinda montara valo ĉe la albanaj Alpoj- daŭrigo de la plej longa eŭropa montovico komenciĝanta de la Svisiaj Alpoj)- Gjakovë- Prishtina (ĉefurbo de Kosovo)- Gadime (vilaĝo kie troviĝas mirinda originala marmora groto)- Prishtina- Kukës- Tirana.



Pol kaj Mirej ĉe la akvofontoj de Valbona

Mirindaj pejzaĝoj de Valbona regiono

Ankaŭ post tiu streĉa longa ekskurso la francaj amikoj tute ne aspektis lacaj. Ili invitis min kaj mian edzinon por vespermanĝi en la "aristokrata" restoracio "Gloria", ne fore de la ilia motelo.



La Groto de Gadime
Valbona

Antikva ŝtona ponto de tajloroj en Gjakovë La rivero

La lasta mateno, la 1-a de Julio, estis bela suna tago. Ni atingis la aeroportan ĝistempojn kaj adiaŭis unu la aliajn tre feliĉaj ĉar ĉio kroniĝis sukcese. Pol sendis salutojn kaj dankmesaĝon el Parizo tuj post sia alveno.



La aragonitaj strangaj kristaloj en Gadime Karakteriza domo en Kruja

La kastelo de Elbasan

Bardhyl Selimi; Fotoj: Mirej; julio 2013

Koran dankon! Tre interesa prezento. Tre bela lando.

Amike, Maria Pietrzak, Pollando

Kara amiko!

Kun plaĉo kaj kortuŝo ni trarigardis belajn vidindaĵojn el via lando.

Vi rememorigis al ni nian belan ekskurson al Albanio.

Elkoran dankon!

Lidia kaj Grażyna, Pollando

dankon! Mi envas la francan paron: belega vojaĝo tra Albanio danke al vi, kara Bardyl!
Korajn salutojn Elda, Italio

Koran dankon pro la sendaĵo!

Kun elkora saluto el Brazilo,

Maria Aparecida

www.bonavolo.com

<http://www.paivanetto.com.br/index.php/esp>

www.facebook.com/bonavolo

Artikoloj

Amikeco, jen mia Religio”

(Artikolo aperinta en centoj da gazetoj, revuoj kaj ttejoj en Brazilo kaj en la mondo).

Paiva Netto



- José de Paiva Netto*, ĵurnalisto, radkronikisto kaj verkisto. Li estas direktoro-prezidanto de LBV.

La nuna tempo postulas grandan atenton pri reardigo de bonaj sentoj, propraj al homa vivo, se ĝi intencas postvivi homece.

Internacia Tago de Amikoj, kiun oni celebras je la 20-a de julio, estas dato, kiun ne rimarkas plej multaj homoj. Tamen, ĝi estas signifoplena faktoro por plifortigo de interrilatoj, por superado de ĉagrenoj, ne nur en familia etoso, sed ankaŭ en kolektiva.

En la Apokalipso de Jesuo, 1:9, Evangeliisto Johano montras — pro la vorto de Dio kaj pro la atesto de Jesuo Kristo — sian kondiĉon de "*partoprenanto kun vi en la aflikto kaj regno kaj pacienco*".

Ekzistas homoj, kiuj interpretas la Libron de Finaj Profetaĵoj reduktante ĝian mesaĝon al la tempo de la kruela Domiciano kaj aliaj senrespondeculoj, kiuj estris la Romian Imperion. Sed la Apokalipso de la Ekumena Kristo estas verko por ĉiuj generacioj. Je la diversaj okazoj, kiam ni reenkarneĝas sur la Tero, la Dia Majstro estas nia kunulo kaj helpas nin venki plej grandajn suferojn, ĝis ni akiros la meriton ne plu penadi ĉi tie.

Malbono en la vivo estas limigata, kvankam multaj homoj pensas male, ĉar ili ne aŭdacas rigardi trans la materian horizonton: ekzistas io plia, kiun ili obstinas ne esplori, ĉar tio ne enkadriĝas en nuntempaj mezuriloj, kiujn konvencia scienco akceptas. Tamen, ĉu morgaŭ ili estos la samaj? Evidente, scienca dogmismo estas plej malbona. Sed amikeco, frateco, konkordo ne suferas limigojn flanke de Dio. Sekve, tia solidara spirito, kiun Apokalipso etendis super la eraojn, ne povas resti jungita al unukorpa irado. (...) La lasta libro en la Biblio ne estas ia regno de hororo. Ĝi parolas al ni pri kunuleco fronte al skuoj kaŭzataj de niaj propraj tutmondaj misfaroj. Jen la Dia Mano dissemas bonegan virton, kie la homo preferas devojiĝi. Temas pri normo de la regado de Jesuo.

Amikeco estas treege grava por postvivado de popoloj. La rimarkinda poeto Alzira Zarur (1914-

1979), bildigas tiun fakton per sia belega

Poemo pri Amikeco:

"Posedas mi, spirito maljunula,/ Kiu rifuzas vivon en soleco/ Evangelion tre personan:/ Amikeco, jen mia religio./

"Ne nur la bestoj vivas en la mondo,/ Kiel insistas ĉiaj egoistoj:/ Sufiĉas trovi plej profundan amon,/ Kiu abundas ĉe la altruistoj./

"Montriĝas amikeco en danĝero,/ En ruino, funebro kaj sufero./ Ĉar estas tre facila amikeco/ Kiu montriĝas nur en la plezuro.

"Ĉi tiu teorio de simplulo/ Venas tamen el homo, kiu vidis/ Dum sia vivo falon pro diboĉo/ Kaj frenezecon de la memdetruo.

"Mi emas plu insisti: mi konstatas/ Ke ofte la artistoj plej fieraj —/ Geniaj prozverkistoj aŭ poetoj—/ Pri la socio faras miskoncepton.

"Sur siaj altaj turoj, iluziaj/ Ili supozas sin la plej superaj/ Kaj izoliĝas for de la Homaro/ Kaj evitas brakumon el la simpluloj.

"Ĉu eblas amricevo sen amdomo?/ Tiaj superaj homoj ne komprenas/ Ke tia egoismo nur pretendas/ La tutan homfrataron malestimi.

"Sed ne, plej altaj, lumaj talentuloj,/ Volvitaj per senfina vanta sento!/ Eĉ plej modestaj homoj, senpretendaj,/ Povas paradizigi nian Teron.

"Necesas tamen en la koro homa/ La sinforĝeso kaj la modestemo,/ Kaj grajno, ero, eta lumradio / Da solidara sento en la voĉo.

"Do urĝas, ke el tiaj altaj turoj/ Loĝejoj de genioj, tuj malsupren,/ Sur ebenejon venu kompatemo/ Al tiuj 'simplanimaj malkleruloj'.

"Ni flegadu, gesinjoroj, amikecon/ Ĉar sankta estas ĝia influado,/ Ni sentu la afliktojn kaj ĝemadon/ De sociaj tavoloj sub premado!

"Pro tio, posedas mi, spirito maljunula,/ Kiu rifuzas vivon en soleco/ Evangelion tre personan:/ Amikeco, jen mia religio".

Sen Kreanto kaj kreito ne eblas paradizo sur la Tero. Esence grava, gesinjoroj, estas starigi kunecon kun Dio — laŭ Aristotelo (384-322 a.K.) la silenta motoro de la Universo — , tiel ke estos eble, ke revenu ĉi tiun mondon la nova Jerusalemo (Apokalipso, 21:24, 25 kaj 26), kiam:

"24 La nacioj promenos per ĝia lumo; kaj la reĝoj de la Tero alportos en ĝin sian gloron.

"25 Ĝiaj pordegoj tute ne estos fermitaj tage (ĉar nokto ne ekzistos tie).

"26 Kaj ili alportos en ĝin la gloron kaj la honoron de la nacioj".

Vera amikeco

Foje, aktorino Luciana Vendramini intervjuiĝis de la brazila revuo *Veja* pri tio, kio motivis ŝin produkti kaj aktori brazilan version de la muzikteatraĵo "Laŭleĝe blondulino", kiu furoris ĉe Broadway. Ŝi klarigis, kio ŝin allogis en la teksto: *"La teatraĵo temas pri vera amikeco. Nuntempe, jam neniu valorigas tion. Jam neniu kredas pri amo"*.

Al mi plaĉis tiu vidmaniero de Luciana, ĉar la nuna tempo postulas grandan atenton pri reardigo de bonaj sentoj, propraj al homa vivo, se ĝi intencas postvivi homece.

*José de Paiva Netto, verkisto, ĵurnalisto, radikomunikanto, komponisto kaj poeto, naskiĝis je la 2-a de marto 1941, en Rio-de-Ĵanejro, RJ, Brazilo. Li estas Direktoro-Prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV), aktiva membro de Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI), de Brazila Asocio de Internaciaj Amaskomunikiloj (ABI Inter), de Nacia Federacio de Ĵurnalistoj (Fenaj), de International Federation of Journalists (IFJ), de Beletra Akademio en Centra Brazilo, de Sindikato de Profesiaj Ĵurnalistoj en Subŝtato Rio-de-Ĵanejro, de Sindikato de Verkistoj en Rio-de-Ĵanejro, de Sindikato de Radikomunikistoj en Rio-de-Ĵanejro kaj de Brazila Unuiĝo de Komponistoj (UBC).

(Artikolo publikigita de ĵurnalo *O Imparcial*, de Monte Alto, San-Paŭlo, Brazilo, prezentita en la *Elsendo Bona Volo*.)

Toksoj: letero de filo al lia patro.

Tiu ĉi estas adiaŭa letero de 19-jara junulo. La afero estas vera, ĝi okazis en hospitalo en San-Paŭlo, Brazilo.

"Mi opinias ke sur ĉi tiu mondo neniu celis priskribi sian propran tombejon. Mi ne scias kiel mia patro akceptos tiun ĉi raporton, sed mi bezonas ĉiujn fortojn dum restas tempo. Mi bedaŭras, mia patro, mi kredas ke tiu ĉi dialogo estas la lasta kiun mi havas kun vi. Mi ege bedaŭras, vere... Jam estas la tempo por ke vi konu la veron pri kiu vi neniam suspektis. Mi estos konciza, klara kaj celtrafa.

Tokso mortigis min, mi konatiĝis kun mia mortiganto kiam mi estis 15-jara. Terure, ĉu ne, patro? Ĉu vi scias kiel mi konis tiun malfeliĉegon? Pere de viro elegante vestita, vere eleganta kaj bone parolanta, kiu prezentis min al mia mortigonto: tokso.

Mi provis rifuzi, vere mi provis, sed la viro tuŝis mian honoron, dirante ke mi ne estas viro. Mi ne bezonas diri plu, ĉu ne, patro? Mi eniris en la mondon de tokso.

Komence okazis revado; poste torturoj, mallumo, mi nenion faris sen la ĉeesto de tokso. Poste venis la aeranko, timo, halucinoj, kaj tuj poste la eŭforio de la klimakso denove, mi sentis min pli forta ol aliaj homoj, kaj la tokso, mia neapartigebla amiko, ridetis, ridetis.

Kiam oni komencas, mia patro, oni opinias ĉion ridinda kaj tre amuza, eĉ DION mi opiniis ridinda. Hodiaŭ, sur hospitala lito, mi rekonas ke DIO estas pli grava ol ĉio en la mondo. Kaj ke sen Lia helpo, mi ne skribus tiun ĉi leteron. Patro, mi estas nur 19-jara, kaj mi scias ke mi ne havas la minimuman ŝancon postvivi. Estas tre malfrue al mi, sed al vi, mia patro, mi faras lastan peton: montru tiun ĉi leteron al ĉiuj junuloj kiujn vi konas. Diru al ili ke ĉe ĉiu pordo de lernejo, de prepara kurso por universitato, ĉie ajn, estas ĉiam viro elegante vestita kaj bone parolanta, kiu montros al ili la mortigonton kaj detruonton de iliaj vivoj, kaj la kondukonton de ili al frenezecon kaj morto, kiel okazis al mi. Bonvolu fari tion, mia patro, antaŭ ol estos tro malfrue por ili.

Pardonu al mi, patro... Mi jam tro suferis, pardonu min ankaŭ ke mi faras vin suferi pro miaj frenezaĵoj. Adiaŭ, mia patro”

Iom da tempo post ol skribi tiun ĉi leteron, tiu junulo mortis.

Noto de la redakcio — Nia ĵurnalo ricevis kopion de tiu ĉi letero kaj ne publikigis la nomon de ĝia aŭtoro.

Jen kial Elsendo Bona Volo frate sugestas: ni bone zorgu pri nia junularo, kiel faras LBV, ĉar al neniuj el ni estas interese havi patrujon el drog-konsumantoj, drinkemuloj kaj malsukcesintoj. Ni volas ja generacion, civilizacion el viroj kaj virinoj, junuloj kaj infanoj honestaj, realigantaj en la Bono, amantaj Pacon, Justecon kaj Veron. Por tio LEGIO DE BONA VOLO senĉese laboras. “Junulo estas la estonteco. Sed ne malproksima estonteco, li estas la estonteco en la estanteco: ni fidu al li”.

La miraklo kiun DIO atendas el la homoj estas ke ili lernu ami unu alian.

***José de Paiva Netto**, verkisto, ĵurnalista, radikomunikanto, komponisto kaj poeto, naskiĝis je la 2-a de marto 1941, en Rio-de-Ĵanejro, RJ, Brazilo. Li estas Direktoro-Prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV), aktiva membro de Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI), de Brazila Asocio de Internaciaj Amaskomunikiloj (ABI Inter), de Nacia Federacio de Ĵurnalistoj (Fenaj), de International Federation of Journalists (IFJ), de Beletra Akademio en Centra Brazilo, de Sindikato de Profesiaj Ĵurnalistoj en Subŝtato Rio-de-Ĵanejro, de Sindikato de Verkistoj en Rio-de-Ĵanejro, de Sindikato de Radikomunikistoj en Rio-de-Ĵanejro kaj de Brazila Unuiĝo de Komponistoj (UBC).

Komentu ankaŭ Vi: